

N° 190  
avril  
mai  
juin  
2020

# LA INFORMILO

N° 190  
aprilo  
majo  
junio  
2020

l'espéranto  
la langue de l'amitié  
sans frontières

## ESPERANTO

Esperanto  
la lingvo de l'amikeco  
sen landlimoj

esperanto  
France-Est

2020  
*Justa komunikado*

### ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle  
pour la promotion  
de la langue  
internationale

### ESPERANTO

regroupant  
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes  
et de la Culture  
"Philippe Desforges"

27, rue de la République  
FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 18 €

Reta abono: 7,50 €



La ville de Mulhouse et tout le Haut-Rhin ont été à la une des journaux à cause d'une rencontre évangélique qui avait réuni plus d'un millier de personnes et qui aurait diffusé le covid-19 dans le Grand-Est. Comme les participants étaient venus du monde entier, les coupables étaient tout trouvés! Nous n'osons pas imaginer ce qu'auraient pensé les Canadiens de l'espéranto si le congrès mondial d'espéranto, qui devait se tenir à Montréal, avait contribué à une large diffusion du virus.

De nombreuses manifestations régionales, nationales et internationales ont dû être annulées. Mais les espérantophones ne sont pas restés inactifs! Comme toutes les personnes travaillant à la maison pour leur entreprise, ils ont trouvé les outils informatiques adéquats pour organiser des rencontres à distance.

Les membres d'Espéranto France-Est ont ainsi pu – grâce à Bernard Behra et André Grossmann – se revoir sur leurs écrans et discuter de vive voix.

## Esperanto-centro en Lesja Ukrainka Orient-eŭropa nacia universitato ĝi jam festas sian 5-jariĝon

En la 3.04.2015 en la ĉefa domo de Lesja Ukrainka Orienteŭropa nacia universitato ĉe katedro pri romanidaj lingvoj kaj interlingvistiko en la fakultato de eksterlanda filologio estis fondita la unua en Ukrainio universitata Centro de Esperanto. La solenaĵon partoprenis: la unua vic-rektoro, prof. Anatolij Cjosj, vic-rektoro pri internaciaj rilatoj doc. Serhij Fedonjuk, tiama UKrEA-prezidanto Eŭgeno Kovtonjuk, la popola aktorino de Ukrainio, prof. de Nacia arta akademio de Ukrainio nome de P. I. Ĉajkovskij, vic-estro de la Societo de amikoj de Esperanto en UkrEA Eŭhenija Basalajeva, instruistoj kaj studentoj de la universitato, la membroj de E-klubo "Arbara kanto", la operatoro-produktisto de la televida kanalo "Rosa-TV" Roman Ĉihrinec, la ĵurnalistoj kaj la foto-korespondentoj de la gazeto "Nia universitato".

### La celoj de E-centro:

- 1) konatigi al studentoj, aspirantoj, instruistoj k.a. la problemon de interkultura komunikado;
- 2) okazigi scienc-praktikajn rondajn tablojn, konferencojn, seminariojn, dediĉitajn al la problemoj;
- 3) organizi internaciajn E-renkontiĝojn kaj vesperojn de internacia amikeco.
- 4) okazigi kunsidojn de E-klubo "Arbara kanto".

### En la centro jam okazis:

- 1) prelegoj de specialigitaj kursoj por la studentoj de la fakultato pri eksterlanda filologio "Ĉefaj aspektoj de interlingvistiko" (2015), "Artefaritaj lingvoj kaj interlingvistiko" (2016–2019);
- 2) 8 scienc-praktikaj rondaj tabloj (ĉeestis estrarano de UEA, eks-prezidanto de ILEI Stefan MacGill, eks-prezidanto de UkrEA Eŭgeno Kovtonjuk, spertaj esperatistoj el la ĉefurbo kaj aliaj urboj de Ukrainio Mikaelo Lineckij, Oleksandr Hriŝĉenko, Sergeo Ŝmatkov, Andreo Jankovskij, la gasto el Pollando Kristoforo Sliwinski, la membroj de E-klubo "Arbara kanto", instruistoj kaj studentoj);
- 3) 8 kunsidoj de E-klubo "Arbara kanto" (2015–2020);
- 4) 3 renkontiĝoj kun estro de la firmao "AU-Pair-kontakt" Manfred Kirsch (Germanio) (2015 – 2017).
- 5) 2 internaciaj sciencaj konferencojn "Interagado de etnaj kaj planitaj lingvoj en la kunteksto de la Eŭropa integriĝo" (2015, 2019).

Dum la jaroj 2015-2019 en la universitato daŭris la scienc-praktika projekto "Lesja Ukrainka en la mondo de la tradukoj" sub gvido de prof. N. Danylyuk. Kiel rezulto estis eldonita por studentoj la instru-metodika lernolibro kun la tekstoj de la tradukoj en la angla, germana, franca, hispana, pola, rusa lingvoj kaj Esperanto (entute 272 paĝoj, Esperanto-parto: 28 paĝoj).



Studentino Tetjana Karpiv en la nacia ukraina vestaĵo, kiu prezentis la poezion de la genia ukraina verkisto Taras Ŝevĉenko en Esperanto.



Dum la solena malfermo: en la unua linio estas Ukr-EA prezidanto Eŭgeno Kovtonjuk kaj lapopola aktorino Eŭhenija Basalajeva.





La instruistoj, studentoj, membroj de Lucjka Esperanto-klubo "Arbara kanto" kun gastoj en la Centro de Esperanto.

Prof. N. Danylyuk prelegis dum multaj internaciaj konferencoj: “La scienc-praktikaj studoj pri Esperanto en ukrainaj universitatoj” dum la 100-a UK en Lillo (Francio, 27.07.2015) kaj dum la 4-a Interlingvistika Simpozio, dediĉita al la 20-a jubileo de Interlingvistikaj Studoj, en la universitato de Poznan (Pollando, 22.09. 2017); “Artaj kvalitoj de la originala poezio de Zamenhof” dum la internacia konferenco, dediĉita al la 100-jara morto-datreveno de L. Zamenhof (Varsovio, Pollando, 27–28.04. 2017); “Esperanto – sukcesa projekto de la internacia planita lingvo: 130 jaroj de funkciado” dum la internacia scienca konferenco “La prioritatoj de la ĝermana kaj romana filologio” (Lucjk, Ukrainio, 12.06. 2017); “Sciencaj pristudoj kaj instru-metodikaj materialoj por instruado de Esperanto en Ukrainio” dum la scienc-praktika konferenco “La influo de la fondo de sendependa asocio de ukrainiaj esperantistoj al evoluo de Esperanto-movado en nia lando”, dediĉita al la 30-jariĝo de UkrEA en la Nacia biblioteko de Ukrainio nome de J. Mudrij (Kijivo, Ukrainio, 17.05. 2019) kaj dum la 52-a ILEI-kongreso (Ĉaĉak, Serbio, 13–20.07. 2019). [artikolo pri ILEI-kongreso en Ĉaĉak aperis en *La Informilo* 187]

Bedaŭrinde pro la pandemio ni ne povas ĉeeste festi la 5-jaran jubileon, sed ni renkontiĝos post la kvaranteno por rememori niajn la plej interesajn eventojn kaj paroli pri estonta agado. Ni kredas, ke la centro de Esperanto havas perspektivon kiel scienc-esplora, kleriga kaj insru-metodika organizaĵo, kiu povas uzi bonajn partnerajn kontaktojn kun diversaj eksterlandaj centroj: Interlingvistikaj Studoj en Poznano (Pollando), Kulturdomo de Esperanto en la Kastelo Greziljono (Francio), Esperanto-grupo en Okcidenta Universitato de Timiŝoara (Rumanio) k.a.

La adreso por kontaktoj:

Lesja Ukrainka Orienteŭropa Nacia Universitato, Prospekt Voli 13, Lucjk 43026, Ukrainio.

La retadreso: [nina.danylyuk@gmail.com](mailto:nina.danylyuk@gmail.com).

Prof. dr Nina Danylyuk, estro de la Centro de Esperanto.



Okaze de Kronviruso la gejunuloj de TEJO kreis filmetojn en Jutubo:

<https://www.youtube.com/watch?v=zNCn-G5I-Qq>



# ESPERANTISTOJ KAJ KRONVIRUSO #2 tejo



El Finnlando sed loĝas en Barcelono, laboras hejme kiel memstara tradukistino.



Elia loĝas en Indonezio proksime de Ĝiakarto



Meva el Francio instruas en mezlernejo sed uzas la retejon.



El norda Hispanio



En Brazilo



Tri studentinoj el Brazilo

**ILI KONSTRUIS LA PIRAMIDOJN!****Sed kiel do ili elturniĝis??**

La Egiptaj Piramidoj konsistas el la plej eksterordinaraj monumentoj, kiujn la homoj iam konstruis.

Inter la plej malnovaj, oni citu la grandan piramidon de Saqqarah, kiu tre similas al la piramidoj konstruitaj de la majaoj en Meksiko.

Laŭ pluraj aŭtoroj, tiu simileco neniel mirigas, se oni akceptas, ke la postvivantoj de Atlantido, kiam enoceanigis ĉi-tiu kontinento, forfuĝis al la Amerikaj bordoj kaj al Afriko, kie ili atingis Egiption, ĉe la fino de longa migrado.-Miriga hipotezo!

Sed la plej fama estas la **piramido de Ĥeops** aŭ **granda piramido de Gizeh**, konstruita antaŭ pli ol 4 500 jaroj, sub la 4a dinastio, en la centro de vasta funebra komplekso situanta proksime de Kairo. Ĝi estas la sola el la *Sep Mirindaĵoj de l'Mondo*, kiu pluvivis ĝis nia tempo. Ĝi estas ankaŭ la plej malnova.



**La 3 mondfamaj egiptaj piramidoj**



La egipta piramido de Saqqarah



Tradicia majaa piramido



La piramido de Ĥeops

Niatempe, ĝia alteco estas 137 metroj. Sed la origina alteco estis 146,7 metroj (280 reĝaj ulnoj). Ĝia bazo estas kvadrato de 230,35 metroj ĉiulatero (440 reĝaj ulnoj). Ĝia volumeno estas 2 592 341 m<sup>3</sup> kaj ĝia maso estas ses milionoj da tunoj. Ĝi kovras areon de 5,3 hektaroj. Ĝi konsistas el blokoj de *kalkoŝtono*, kun denseco 2,7. Ekzistas 201 ŝtonaj tavoloj, kio respondas al proksimume 2 600 000 ŝtonoj, el kiuj ĉiu ampleksas averaĝe iom malpli ol unu kubmetron kaj pezas 2,3 tunojn. Sed kelkaj pezas plurajn dekojn da tunoj, eĉ ĝis 500 tunojn.

**La konstruado de la piramidoj**

La **klasika teorio** venas de Herodoto (484-420). Ĝin oni ofte rediris. Laŭ tiu greka historiisto, oni uzis cent mil virojn, kiujn oni renovigis ĉiun trian monaton. *“Dek jaroj necesis por konstrui la ŝoseon, sur kiu oni devis treni la ŝtonojn. La piramido mem kostis dudek jarojn da laboro. Oni konstruis ĝin laŭ gradoj. Kiam la konstruado estis komencita, oni levis el tero la aliajn ŝtonojn kaj oni suprenportis ilin sur la unuan vicon de ŝtonoj helpe de mallongaj lignopecoj. Kiam unu ŝtono estis metita tien, oni metis ĝin en alian maŝinon, kiu estis sur tiu unua tavolo. De tie, oni suprenirigis ĝin helpe de alia maŝino, ktp”.*

Laŭdire, la ŝtonoj estis do alportitaj per ŝipo, estis **tajlitaj** kaj poste **lokitaĵoj** de skipoj de miloj da sklavo, kiuj tiris tiujn ŝtonojn helpe de ŝnuregoj sur **dekliva ebena** konstruita ĉirkaŭ la piramido.

La transporton de la ŝtonoj oni klarigis per sistemo de kluzoj ĝis la piedo de la piramido. Tiaj sistemoj ebligis la suprenirigon de la ŝtonoj, sed verŝajne nur ĝis la unuaj gradoj. Aliaj sistemoj de leviloj, baskuloj, ktp, ebligis la movon de tiuj ŝtonoj. Kaj tiu giganta laboro estus finfinita en la daŭro de dudek jaroj!

Bedaŭrinde, tiu skemo entenas grandegajn **teknikajn neeblaĵojn**. Ekzemple, tiri 15-tunan ŝtonon sur 17-grada dekliva ebena, necesigas minimume 300 virojn.

Treni totalon de 6 000 000 tunoj necesigus dekmilojn da viroj. Nu, la tuta areo de la Ĥeopsa piramido estas kvin hektaroj. Tio implicas, ke la laboristoj estus premitaj unu tute kontraŭ alia. Kun tia denseco de laboristoj, estus nenia ebleco, ke ili laborus normale kaj efike.

Plie, starigi 2 600 000 ŝtonojn en dudek jaroj estas starigi 130 000 ŝtonojn en ĉiu jaro, do proksimume 360 ŝtonojn en tago, t.e. unu ŝtonon en malpli ol du minutoj, do preskaŭ 1000 tunojn en tago. Tiu nombro ne povas kongrui kun la ebleco de starigo per deklivaj ŝoseoj.



Plie, tiu hipotezo implicas tutjaran laboron, 365 tagojn en jaro. Sed ŝajnas, ke ĉiun jaron, la konstruado povis okazi nur dum la inundo de Nilo, t.e. de Julio ĝis Novembro, do inter 100 kaj 120 tagojn en jaro. Efektive, ekster tiuj periodoj, Nilo estis tro malalta, kaj ne povis porti la konstruajn materialojn transportendajn per rivera vojo. Aliflanke, kiam la nivelo de Nilo estis malalta, la laboristoj agadis en la kultivaj kampoj.

Do ili laboris ĉe la piramida konstruado nur dum la inundoj, kiam la kampoj estis kovritaj de la ŝlima akvo de Nilo. Nu, dudek jaroj da tia laboro respondas nur al proksimume ses jaroj kaj duono da efektiva laboro.

Oni ankaŭ memorigu, ke proksime de la piramido, oni devus trovi **defalaĵojn de tajlitaj ŝtonoj** (numulita kalkoŝtono), eble ne en la apudaĵo de la piramido, sed almenaŭ en la proksima dezerto. Nu, neniu tia defalaĵo estas trovebla.

Jen alia punkto: la volumeno de la **deklivaj ŝoseoj**, kiuj devis esti faritaj, estus grandega, ĝi preskaŭ atingus la volumenon de la piramido! Tute same, ni trovas nenian spuron de tiuj deklivaj ŝoseoj, kiuj tamen devus esti longaj je 2 kilometroj kaj necesigus eksternormajn kvantojn da argilo.

La transporto kaj la starigo de tiuj hipotezaj ŝoseoj estas nenie elvokitaj en la egiptaj arkivoj, kvankam ni konas la koston eĉ de plej malgrandaj elspezoj.

Oni aldonu akcesoran detalon. Por ke ŝtono bone glitu sur argilo, laŭ la teknikistoj, oni devas iom malsekigi tiun argilon, kiu tiel iĝas pli glitiga. Nu, kiam oni malsekigas argilon, unua glita ŝovo estas efektive ebla. Sed ĉe la postaj ŝovoj, la argilo iĝas koto, tio estigas veran kotejon, en kiu la ŝtonoj povas nur profundigi, ne gliti.

Ni venu al la **plej grava problemo**, la problemo de la **tajlado** kaj de la **lokado de la ŝtonoj**. La plej grandaj el tiuj ŝtonoj pezas dekojn da tunoj.

Tiuj ŝtonoj ne estas perfektaj paralelepipedoj. Se la ekstera faco estas perfekte vertikala, la facoj kontaktaj kun la aliaj ŝtonoj montras angulojn tute hazardajn. Nu, la apuda ŝtono alĝustiĝas tre precize kun la sama angulo. La interŝtonaj **juntoj** havas konstantan dimension **malpli grandan, ol unu milimetro**, tiagrade, ke **estas neeble enŝovi eĉ klingon de tranĉileto**. Du ŝtonoj de kelkaj tunoj alĝustigitaj kun milimetra precizeco!!!

La granda egiptologo *Flinders Petrie* nomis tiun laboron: *“giganta masonaĵo kunigita per lupeo far horloĝisto”*.

Kiel oni povis realigi tiujn diversajn angulojn kun tia ekzakteco? Ĉio okazas, kvazaŭ la ŝton-tajlisto metus la ŝtonon en la ĝustan lokon, konstatus la neregulaĵojn de la apuda ŝtono, modifus ĝian formon ĝis la plej malgrandaj detaloj, plurfoje, reinstalus la ŝtonon, ree deprenus ĝin, ree modifus ĝin, ktp, ĝis la ĝustigo estos milimetre perfekta.

Tiu metodo necesigus multajn irrevenajn movojn de ŝtonoj, kiuj pezas plurajn tunojn. Tio estas **absolute neebla**. Tiel, oni povas konkludi, ke la hipotezo, ke la piramidaj ŝtonoj estus tajlitaj, kiun antaŭe multaj inĝenieroj kaj egiptologoj rigardis kiel la teknikan solvon, **alportas neniun respondon** al la realaj demandoj.

Kiel finon, oni rimarku, ke **neniu desegnaĵo**, en la piramidoj aŭ aliloke, neniu dokumento, montras la konstru-teknikon de la piramidoj. Kvankam plej malgranda agado fiŝkapta, breda aŭ kultiva, estas priskribata en la surskribaĵoj de la egiptaj temploj, la konstruado estas neniam montrata.

#### Teorio de la aglomeritaj ŝtonoj.

Ŝajnas, ke ĉiuj problemoj rilataj al la konstruado de la piramidoj estas solvitaj helpe de la teorio de la aglomerado, elpensita en 1978 de la franca profesoro **Joseph Davidovits** (1935-), kemia inĝeniero, fakulo pri la geopolimerigo. La geopolimeroj estas mineralaj materioj ricevitaj


industrie, per sintezo.

Laŭ tiu teorio, la egiptaj piramidoj ne estis faritaj per *tajlitaj* ŝtonoj, sed per **reaglomeritaj ŝtonoj**: la ŝtonajn blokojn oni **muldis**, tute same kiel oni muldas gipson aŭ betonon. Temas pri natura kalko-ŝtono pistita, miksitaj kun ligmaterio, fine muldita.

La argila kalkoŝtono, nature ĉeestanta sur la loko de la konstruado, estas iom pulvoriĝema. Ĝi estis pulvorigita en akvo kaj pistita, poste miksitaj kun lig-materio konsistanta ĉefe el natro kaj kalko. Natro ( $\text{Na}_2\text{CO}_3$ , 10  $\text{H}_2\text{O}$ ) konsistas el hidratigita natria karbonato; oni uzis ĝin ankaŭ en la mumiigado. Tiu miksaĵo, verŝita surloke en muldilojn, solidiĝis kaj formis reaglomeritan ŝtonon, same firman, kiel natura ŝtono, kaj prezentantan ekzakte la saman aspekton. *Joseph Davidovits* kaj lia skipo faris eksperimentojn pri muldado de ŝtonoj en



Moderna ŝton-tajlisto laboras per elektraj maŝinoj



Hipotezo de la deklivo

vera dimensio: ili montris, ke tiu metodo finvenas al ŝtonoj tute naturaj, tiagrade, ke eĉ geologoj ne povas konstati diferencon.

Do la ŝtonoj, alportitaj per ŝipo ĝis la piedo de la piramido, estis **pistitaj** helpe de klaboj el tre malmola ŝtono, kaj ŝanĝitaj al elementoj metebraj en korbojn. Poste, tiuj elementoj estis levitaj ĝis la definitiva alteco de la lokenda ŝtono. Tiu ŝtono estis limigita de simplaj lignotabuloj, kiuj ebligis la muldadon.

Internen de tiu ŝelaĵo, oni metis la diversajn ingrediencojn: la rezulton de la pistado de la ŝtono, la lig-materion kaj la katalizantojn, kaj evidente akvon. La ligno-tabuloj uzataj por fari tiun muldadon estis ja vertikalaj ĉe la ekstera faco, kio donis perfektan facon por la ŝtuparegoj. Inverse, la faco apudanta la postan ŝtonon estis simple farita per lignotabuloj kun ajna angulo tute sen graveco. Koncerne la supran surfacon de la "ŝtono", ĝi estis devige horizontala (pro gravito, ĉar ĝi estis akveca surfaco). Post kiam la cemento firmiĝis, almenaŭ supraĵe, sufiĉis, ke oni malmuldis, kaj la latera faco de la "ŝtono" utilis kiel muldilo por la sekvanta "ŝtono", kun la instalado de pliaj lignotabuloj.

Per tia tekniko, la Granda Piramido povis esti konstruata helpe de 1500 laboristoj, ĉar la realigo de multaj ŝtonoj en unu tago estigas nenian malfacilaĵon, pro la fakto, ke oni povas labori ĉe iu ŝtupego en pluraj lokoj samtempe kaj pluri, kun diversaj sinsekvaj laborlokoj. Eĉ dekliva ŝoseo ne estas necesa: simplaj ŝtupetaroj tute ebligas, ke oni aliros al ĉiu ŝtupego por tien alporti la sakojn da materio.

Favore al tiu aglomera tekniko pledas aliaj **argumentoj**.

La ŝtonoj de la piramido formiĝis per sedimentiĝo en maraj zonoj. Do ili entenas fosiliajn **konkojn**. En la naturaj ŝtonoj, tiuj konkoj estas do stratumaj, t.e. aranĝitaj laŭ horizontalaj tavoloj. Nu, en la piramidaj ŝtonoj, tiuj konkoj estas **fuŝmiksitaĵoj**, hazarde orientitaj, sen ia prefera orientiĝo. Evidente, tiun nenormalaĵon oni ne retrovas en la karieroj, de kiuj tiuj ŝtonoj supozeble devenas.

Oni rimarkis alian fenomenon samkonkludan: En la Granda Piramido, la turistoj povas konstati, ke en la centra koridoro, **akvo glitfluas ĉe la rok-vandoj**. La gvidistoj klarigas serioze, ke tiu akvo devenas de la spirado de la turistoj: ĉi tiu entenas akvo-vaporon, kiu kondensiĝas kaj fluetas ĉe la kontakto de la malvarma ŝtono.

Sed tiu klarigo estas sensenca: la du ceteraj grandaj piramidoj, de Ĥefren kaj de Mikerino, estas fermitaj de multaj jaroj; tamen akvo plu fluetas interne de la centra koridoro. De kie venas tiu akvo, en regiono, kie pluvigas malpli ol 20 milimetrojn en jaro? Plie, se tiu akvo enirus je kelkaj centimetroj en la ŝtonon, ĝi ne

atingus *la internon de la monumento*, kaj havus do tute sufiĉan tempon por vaporiĝi pli frue ol la posta pluvo-falo.

Tiu mistero estas nun klarigita, dank'al usona skipo, kiu serĉis en la Granda Piramido eventualan novan morto-ĉambron, kiu povus esti kaŝita ie en la mezo de la 2, 6 milionoj da ŝton-blokoj.

Tiu skipo disponis pri **speciala radaro**, kies ondoj kapablis disvastiĝi en la internon de ŝton-amaso. Nu, oni konstatis, ke la ondoj ne penetris en la ŝtonojn de la piramido. La sciencistoj de la esplora ekspedicio rimarkis tiam, ke la radaraj ondoj pasas bone tra la sekaj ŝtonoj, sed estas haltigitaj de la ĉeesto de akvo. La konkludo, kiu mem-trudiĝis, estas la ĉeesto de granda akvokvanto *en la interno mem de la piramido*.

Tiu ĉeesto de akvo konfirmas la teorion de la aglomerado, ĉar tiu fabrikado de aglomeritaj ŝtonoj necesigis iom grandan kvanton da akvo, kaj la rapido de farado ne ebligis, ke tiu akvo vaporiĝos. Ĝi estis do kaptita de la sekvantaj ŝtonoj. Tial, oni nuntempe retrovas en tiuj ŝtonoj la akvon uzatan por ilia fabrikado. Ĝi estas fosilia akvo datumanta de preskaŭ kvin jarmiloj!

Oni kelkfoje rebatis, ke tiun teknikon de aglomeritaj ŝtonoj konfirmas neniu desegnaĵo, kio iom mirigas. Jen la verŝajna kaŭzo de tiu fakto: la tajlado de ŝtono estis normala agado, ofte prezentata sur desegnoj; inverse, la aglomerado estis tekniko ebliganta la transformadon de polvereca tutaĵo en malmola bazo; nu, ĝi estis rigardata en tiu tempo kiel apartenanta al la magio. Tio estis sekreto rezervita al la solaj iniciatoj, la homoj, kiuj konis la uzendajn elementojn. Estas do tute ne mirige, ke la aglomerado ne estis montrata.

Alia esploristo, **Joël Bertho**, arkitekto pri strukturoj, fakulo pri muldaĵoj kaj transformado de materioj, demonstras de post 2001, ke muldi ŝtonon surloke, suprenmetante sablon, akvon kaj lig-materion eltiritan el Nilo, estas ege pli facile, ol suprenirigi plur-tunajn ŝton-blokojn.

Li certigas, ke per tiu tekniko, grandegaj ŝton-blokoj konkavaj kaj konveksaj estas perfekte kunigeblaj kun milimetra precizeco, kio estas nepre neebla per la tajlado de la ŝtonoj.

Aksesore, tiu teorio alportas respondojn ankaŭ al la malfacilaĵoj, kiujn alportas la fabrikado de statuoj kaj vazoj el malmola ŝtono, kun delikataj formoj kaj bela surfaca aspekto; ŝajnas, ke ĉi tiuj ne estas realigeblaj per la tajlaj metodoj, en tempo, kiam ĉiuj iloj estis nur ŝtonaj aŭ kupraj.

Oni devas mencii, kiel finon, ke tiu tekniko de la ŝton-aglomerado estis uzata por la grandaj piramidoj, la nordaj. Inverse, ŝajnas, ke la malgrandaj sudaj piramidoj estis konstruitaj per tajlitaj ŝtonoj.

Kiel ĉiu nova teorio progresiganta la homan scion, ĉi tiu estis kontraŭata de multaj profesiaj egiptologoj, ĉefe pro tio, ke ili timas, ke tiu klarigo malfavoros la famon de la piramidoj, do la amasan alvenon de la turistoj, ĉefan riĉaĵon de Egiptio.

Tamen, nur la fabrikado de la ŝtonoj per aglomerado ebligas la solvon de ĉiuj demandoj, kiuj restis sen respondo antaŭ la apero de tiu teorio.

**André Cherpillod**

Notu bone: multaj fontoj pri tiu temo haveblas sur interreto. Ekzemple rigardu la video-muntaĵon (en la franca, sed eble ekzistas en aliaj versioj)

<http://www.geopolymer.org/fr/archeologie/pyramides/les-pyramides-4-videos-telechargement-chapitre-1/>

Aldono al la supra artikolo: Pluraj esploristoj interesiĝis pri tiu hipotezo de la konstruado per la metodo de aglomeritaj ŝtonoj (tiel teknike nomata "geopolimera betono")

Piramidoj: la paleomagnetismo montras la artefaritan naturon de la ŝtonoj.

Antaŭ nelonge, en la scienca revuo "Europhysics news" eldonita de la Eŭropa Socio pri Fiziko, artikolo montras, kiel la studo de paleomagnetismo (praa magnetismo) povas klarigi la originon de la ŝtonoj sur la piramidoj. Du sciencistoj, D-ro Igor Túnyi de Bratislava (Slovakio) kaj Ibrahim A. El-hemaly de Kairo (Egiptio) pensis, ke la orientiĝo de la magnetaj momentoj sur la ŝtonoj estus malsimilaj, se la ŝton-blokoj estis tajlitaj aŭ mulditaj. En la unua kazo, la magnetaj momentoj estos malsimilaj de unu ŝtono al alia, ĉar la ŝtonblokoj estis iom metitaj hazarde sen kontrolo de supro/malsupro aŭ dekstro/maldekstro. Male, en la dua kazo, se temas pri la tekniko de aglomeritaj ŝtonoj, la magnetaj momentoj devus esti similaj por ĉiuj ŝtonoj.



Ĝuste eltroviĝis, ke la vektoroj de magnetaj polarizado prezentas la samajn direktojn (norde/sude) sur ŝtonoj de la piramidoj de Ĥeops kaj Kefren. Tio pruvus la ĝustecon de la hipotezo de Davidoviĉ pri l'artefarita naturo de tiu ŝtonoj. Notindas, ke la unuaj tavoloj de la piramido de Ĥefren konsistas el naturaj (tajlitaj) blokoj, ĉar je tiu alteco ankoraŭ eblis movi ŝtonojn.

Malantaŭ la piramido de Ĥefren, videblas ĉe la fono la Granda Piramido de Gizeh, tiel nomata Piramido de Ĥeops




Ĉi-tiu artikolo aperis en la eldonaĵo de TAKE, "KONSTRUADO-kajero de TAKE 2016". Estas mendeblaj ĉe nia kasisto jenaj numeroj: Konstruado-kajeroj 2020 2019 2018 2017 2016. 10 eŭroj por unu ekzemplero aŭ 16 eŭroj por 2 ekzempleroj aŭ 2 numeroj.

**La ĉi-subaj bildoj ilustras la tiamajn labor-metodojn por konstrui piramidojn**



Estas mendeblaj ĉe nia kasisto jenaj numeroj: Konstruado-kajeroj 2020 2019 2018 2017 2016. 10 eŭroj por unu ekzemplero aŭ 16 eŭroj por 2 ekzempleroj aŭ numeroj.



<b>Espéranto France-Est</b> http://esperanto.france.est.free.fr.		<b>Orient-Franca Esperanto-Asocio.</b>
<b>La Informilo</b>	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>
<b>Rédaction:</b> <b>Redaktoro:</b>	Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto <i>Président</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Help-sekretariino <i>Secrétaire-adjointe</i>	S-ino Liliane BERSWEILER 1 chemin du Lacé 54990 XEUILLEY	03.83.47.41.36 06 76 54 77 78	liliber54@yahoo.fr
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	09.86.38.78.61	andreo.ag15@sfr.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i> Vic-prezidanto	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Aliaj komitatanoj	S-ro Robert KUENY	09.71.31.37.62	kueny.robert@orange.fr
<i>Assesseurs</i>	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Michel Basso	03.89.80.86.12	clbm@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net
	S-ro Gilbert STAMMBACH	06 87 40 01 16	gilbert.stammach@gmail.com
	S-ro Hervé KIEFFER	06.21.09.19.98	kiefferherve@gmail.com

<b>Abono al La Informilo →</b>	18 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← <b>Abonnement à La Informilo</b>
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	<b>Esperanto France-Est</b>		← <b>Paiement par chèque au nom de</b>
Pagoj per ĝiro al jena konto →	<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>		← <b>Paiement par virement au compte</b>
Per internacia ĝiro →	IBAN: FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC: PSSTFRPPNCY		
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

- |                                    |                               |
|------------------------------------|-------------------------------|
| 1. Kronoviruso en Mulhouse         | 15. Gaja semajn-fino + Bavelo |
| 2. Esperanto - Ukraina univesitato | 16. Zagrebo tertremo          |
| 3. Esperanto - Ukraina univesitato | 17. ILEI-informoj             |
| 4. Gejunuloj kaj kronoviruso       | 18. ILEI-informoj + Venezuelo |
| 5. Ili konstruis piramidojn        | 19. Venezuelo                 |
| 6. Ili konstruis piramidojn        | 20. Enigmoj kaj anekdotoj     |
| 7. Ili konstruis piramidojn        | 21. Karlo de Edmond Privat    |
| 8. Ili konstruis piramidojn -TAKE  | 22. Inna + Podkasto           |
| 9. Komitatanoj kaj enhavo          | 23. Goma kaj Kalima           |
| 10. Angulo de la prezidanto        | 24. Goma kaj Kalima           |
| 11. Avula angulo (sekvo)           | 25. Goma kaj Kalima           |
| 12. Kanto "Kiel vi"                | 26. Goma kaj Kalima           |
| 13. Legita libro "La Novico"       | 27. La renaskiĝo de la stelo  |
| 14. Gaja semajn-fino en Rottweil   | 28. Foto-paĝo                 |

**ISSN 0291 6037 trimestriel**  
**N° CPPAP : 0409 G 83517**  
bulletin d'information bilingue sur l'espéranto  
édité par l'association culturelle  
**Esperanto France-Est**  
MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République  
**54000 NANCY**  
Directeur de la publication : **Edmond LUDWIG**  
Rédacteur provisoire : André Grossmann  
Dépôt légal : **30 septembre 2013**  
Imprimé par l'imprimerie Sprenger



Karaj gesamideanoj,

Pro la minacanta kronviruso, kiu invadis niajn vivojn, multaj inter ni devis ŝanĝi siajn vivkutimojn, ĉefe vojaĝajn. Pli ol unu eĉ perdis sian vivon pro tiu virusaĉo aŭ plu suferas fizike. Ĉu tiu plago iam malaperos? Kiom da homoj sin jam vidis mortontaj. Iuj eble pro tiu krizo perdis/perdos sian laboron. Sed malgraŭ tiu minaco ni ne perdu la esperon!

Vi certe scias, ke la rusa verkisto Leo Tolstoj eklernis Esperanton kaj ĝin propagandis. En sia romano *La kozakoj*, kiun mi ĵus finlegis, la heroo, la kadeto Olenin – fakte Tolstoj mem -, malkovras sencon por sia vivo. “La feliĉo konsistas en tio ĉi: vivi por aliaj, tio klaras” li ekkrias!

Hazarde mi hodiaŭ mem spektis videon en la retejo: <https://tubaro.aperu.net/>

Ties titolo estas: ***La mondon plibonigas honestaj homoj***

[https://tubaro.aperu.net/v/ytb\\_z0vYyxANzIU/](https://tubaro.aperu.net/v/ytb_z0vYyxANzIU/)

Spektu, gesamideanoj kaj aprecu!

E. L.

## Dankon al kontribuantoj

En ĉi-tiu numero 190 ne plu troviĝas informoj pri okazintaj Esperanto-aranĝoj. Tut-unue estis nuligita nia regiona staĝo en Art-sur-Meurthe. Komence mi ne certis pri la prava decido de Jean-Luc. Poste ankaŭ venis informoj pri la nuligitaj IFEF-kongreso en Frankfurt ĉe Oder kaj pri la Esperanto-tagoj en Freiburg. Kaj finfine eĉ UK en Montrealo ne plu povas okazi.

Malgraŭ tio, venis kontribuoj por plenigi tiun numeron 190 de La Informilo. Mi deziras danki al ĉiuj kontribuantoj, ofte ekster nia federacio:

Nina Danykyuk el Ukrainio, Pierre Grollemund kaj Manfred Westermayer, Liba Gabalda, Spomenka Ŝtimec, Darina Peticova el Slovakio, Lorenzo Tomezzoli kaj Roberto Kueny, Joël Grandjean, Armand Hubert, Bernard Behra.

Jam iom ŝanĝiĝas la situacio, eble eĉ baldaŭ malfermiĝos la landlimoj kaj nia tri-landaj aranĝoj povas refoje okazi. Dume ni restu atentaj respektante la sekurecajn distancajn kaj sintenadojn.

Tiel en venonta septembro povos aperi la numeron 191 kun espereble pli pozitivaj informoj.

Jam nun mi antaŭ-dankas vin pro viaj daŭraj kontribuoj.

Krome mi deziras ankaŭ danki al ĉiuj abonantoj al La Informilo, kiuj fidele kaj akurate pagas sian abonon. Dank'ak ili nia bulteno povas plu funkcii kaj informi la samideanojn en niaj departementoj kaj eĉ pli fore kaj internacie.

En la retejo de nia asocio **Esperanto-France-Est** estas nun elŝuteblaj ĉiuj numeroj de La Informilo ĝis al jaro 2018

En la menuo alklaku: Historio de Esperanto-France-Est. poste ĉe Historio elektu la jarojn por atingi la taŭgan tabelon.

Jaroj >	2014	2015	2016	2017	2018	2019	2020
<u>Unua trimestro:</u>	<a href="#">n°165</a>	<a href="#">n°169</a>	<a href="#">n°173</a>	<a href="#">n°177</a>	<a href="#">n°181</a>		
<u>Dua trimestro:</u>	<a href="#">n°166</a>	<a href="#">n°170</a>	<a href="#">n°174</a>	<a href="#">n°178</a>	<a href="#">n°182</a>		
<u>Tria trimestro:</u>	<a href="#">n°167</a>	<a href="#">n°171</a>	<a href="#">n°175</a>	<a href="#">n°179</a>	<a href="#">n°183</a>		
<u>Kvara trimestro:</u>	<a href="#">n°168</a>	<a href="#">n°172</a>	<a href="#">n°176</a>	<a href="#">n°180</a>	<a href="#">n°184</a>		



## AVULA ANGULO

Armand HUBERT ... *alflugas rememoraĵoj*

## Ĉu OLDA TEMPO pli BONIS ol NUNA ?

*Onidiraĵoj asertas, ke la pasinteco estis pli kontentiga ol la nuneco. La vivo estis pli simpla, pli agrabla, pli... Ĉu tio certas? Notindas, ke niaj prafamilianoj malpli postulemis, kontentiĝoj pli facile plenumebliis.*

*Avo mia estis feliĉa homo. Rememoro de li alvokas tiujn "bonajn tempojn", antaŭ la Dua Mondmilito.*

## La paskaj dimanĉoj de Avo Josef

Dum paska dimanĉo la koro de la vilaĝo batas en la preĝejo; surstrate, kiel dum izolecado, neniuj pasanto. Sed la festa diservo finiĝas kaj la vivo denove vivigas unue la tombejon, poste la preĝejan placeton kaj fine la stratojn.

Avo Josef estas inter la fideluloj. Li sentas sin komforta en sia dimanĉa kostumo, kiu utilis dum jaroj, dum festaj kaj funebraj tagoj. Li ŝanĝis la ĉemizon kaj la kalsonon por la semajno; li estis zorge razita. Nu! La eklezio organizis la elstaran okazaĵon de la festotago. Ĉio ŝajnas pli malpeza, pli aerumata: la homoj ridetas, interŝanĝas bagatelaĵojn; babilante ili ariĝas sur la placeto. La daŭra grincado de la tombeja ferporo substrekas la eliron de la fideluloj.

Avo Josef gustumas la ferian tagon, post laciga semajno. Li sentas sin sanktigita, preĝinte kun ĉiuj, kantinte psalmojn, motetojn kaj aliajn latinaĵojn, nekomprenablajn sed ege kutimajn. Li tamen agnoskas, ke li ne sekvis la predikon de la pastro - tro longan. Sed tio ne gravas, la festotago pluiras.

La preĝeja placeto malpleniĝas. Ampleksa aro da viroj direktas sin al la kafejo. Post glaso da roza vino, aperitivo aŭ limonado, la koro de la vilaĝo brue batos en la drinkejo. Avo Josef ne estas ariĝema. Alkoholo, brando? Nur kiam lia digesto postulas tion; prefere al kamomil-teo! Nun lia hejmo lin vokas. Klukado de kokinoj en la korto bonvenigas lin. Ĉi-matene la karaj farm-birdoj vete kantas pro sukcesa demetado de ovo.

En la domo la virinoj jam laboras: potkovriloj bruas en la kuirejo. Avo Josef restadas ĉe la piedo de la ŝtuparo, ĉar la "paskaj nestoj" de la genepoj ankoraŭ ĉeas. Dumnokte la "paska leporo" ilin provizis per du kolorigitaj ovoj, malgranda ĉokolada kuniklo kaj dolĉaĵoj. Rideto. Kun plezuro li plue observas la du ŝu-skatolojn, por kiuj la infanoj ŝparis nek fojnnon, nek muskon, nek luzulojn (florantajn herbojn): la tuton ja neprigis Pasko. Fine allogis la kuirejo. Ĉu la hodiaŭa menuo prezentos festan saŭrkraŭton, ĉu ruĝan brazikon kun kuniklaĵo?

Pasko! Atendita tago post strikta fastado.

## Avino Elisabeth

Je la sesa matene, mi, - eta paŝtisto -, sekvis la bovinojn de avo Josef sur la vojo al paŝtejo. Ne necesis gvidi la brutaron, ĝi bone konis la direkton kaj ĝia vekhorloĝo akurate funkciis. Je mia flanko estis tro frue matene: pro junula ĉagreno mi lamis malantaŭ la bestoj. La grego siaflanke lerte marŝis, ĉar unu kilometron for atendis ĝin rose kovrita herbo. Ne troviĝis tempo prokrastenda!

Post la lasta domo en la valo, jen la ĝardeno de avino Elisabeth. Ŝi jam estis tie, ne videbla pro la stangoj de la faboj, sed aŭdebla. Ŝi laŭte deklamis sian matenan preĝon. La Ave-Maria-oj ripetiĝis kaj la Patro-Nia sonoritis inter aliaj devotaj demandoj, laŭ la ĝardenaj vojetoj, proksime al la rojo. Tiu modesta rivereto, tapiŝita de rozkolora sablo kaj lulanta siajn herbojn, fidelis je akvo. Sed ĉi-matene akvumado ne bezonatis.

Eble ĉi-vesperon! Je sunsubiro!



kamomilo eŭfrazio centaŭreo

Tiam mi povos aliri ŝin. Bonvenigote.

La turneo de la avinaj teoj plezurigos. La *kamomilo* regas san-aspekta. "Sed la herbon, kiun vi plukos en kampo pliaktivis!" La *mento* estas bele verda kaj promesplena: ni kaptos folion, premos ĝin inter du fingroj: "Agrabla parfumo! Ĉu ne?" Ŝi daŭrigos: "Ekvizeton kaj *akileon* ne necesas semi; ili kreskas sen helpo. *Eŭfrazio* rifuzas la manon de ĝardenisto, ĝi volonte aperas tie sur deklivo ekster la bariloj. La *spireon* vi iros pluki ĉe la rivero kaj la *hiperikon* nur sur la monto, proksime de la arbaro. Tie eble bonŝance vi trovos ankaŭ la *centaŭreon*, kiu nomiĝas *Tausend-guldenkraut* en la germana. Tio signifas *herbo valoranta milon da guldenoj*. Ĉu vi komprenas, kiom ĝi gravas en mia kolekto?"

Brava avino Elisabeth! Ne forgeseblas viaj rekomendoj.

## KIEL VI

Jean-Jacques Goldman

(esperantigis Lorenzo Tomezzoli laŭ iniciato de Roberto)

### Roberto skribas:

Kial traduki al Esperanto tiun francan kanzonon "Comme-toi" de la franca kantisto kaj komponisto *Jean-Jacques Goldman*.

La ideo venis de mia familia kuracisto, kiu terure ŝatas tiun kanzonon, kaj eĉ ambicias krei K-diskon de tiu kanzono en diversaj lingvoj, kantata de koruso.

Li ja scias, ke mi parolas la internacian lingvon, tial, kial ne prezenti la kanzonon ankaŭ en Esperanto. Li demandis al mi ĉu eblus?

Mi kontaktis miajn plej eminentajn kolegojn por krei tradukon de tiu kanzono, kaj ankaŭ kun la helpo de eminenta itala esperantisto, kiu multfoje tradukis kanzonojn, la rezulto estas la kreado de la "Kiel vi" poemumita same kiel en la franca. Sekvanta etapo estas trovi esperantistan koruson por plenumi la taskon."



Ŝi pozis dum vesper' en printempa la lum'  
Kune kun la patrin' staris ŝi sub la sun'  
Kaj tuta famil' ĉeestis por  
Fotada fervor'

Mezbona la fotaj' sed videblas l'esper'  
Tiom da kvietec' en mideca vesper'  
Muzikon amis ŝi, ĉefe Ŝuman'  
Kaj eĉ Mozart'

Kiel vi  
Kiel vi, kiel vi, kiel vi  
Kiel vi  
Kiel vi, kiel vi, kiel vi  
Vi, kiu dormas dum rigardas mi  
Vin, dum vi sonĝas eble nur al vi  
Kiel vi, kiel vi, kiel vi

Ŝi iris al lerneĵ' lernis ŝi pri la viv'  
Nenian trafis ŝin malespera motiv'  
Aŭdiĝis dum reven' mildega kant'  
De ĝoja knabin'

La ludon amis ŝi, kiel juna infan'  
En la fabel' princin' ekestis de la ran'  
Kiu en la arbar' dormadis dum  
Centjara temp'

Kiel vi  
Kiel vi, kiel vi, kiel vi  
Kiel vi  
Kiel vi, kiel vi, kiel vi  
Vi, kiu dormas dum rigardas mi  
Vin, dum vi sonĝas eble nur al vi  
Kiel vi, kiel vi, kiel vi

Ŝi fidi pri l'estont' kaj amik' Jeremi'  
Kiu amegis ŝin kun tre forta pasi'  
Tial ke geedziĝ' okazos ja  
En urb' Varsovi'

Pro milda la rigard' , ŝi similis al vi  
Ok-jara, jen Sarah' en nia famili'  
Sed ne naskiĝis ŝi en nuna temp'  
Kaj tie ĉi

Kiel vi  
Kiel vi, kiel vi, kiel vi  
Kiel vi  
Kiel vi, kiel vi, kiel vi  
Vi, kiu dormas dum rigardas mi  
Vin, dum vi sonĝas eble nur al vi  
Kiel vi, kiel vi, kiel vi



## La novico

*Dankon al Bernard pro la traduko de tiu interesa teksto*

Antaŭ nelonge, en antikva regno de Himalajo, novica monaĥo iris unua-foje renkonti sian majstron, li estis feliĉa baldaŭ sekvi lian instruadon. La majstro sobre salutis lin kaj post longa momento de silento donis al li kelkajn instrukciojn:

*“Por via unua leciono, mi petos leviĝi tre frue morgaŭ matene kaj surgrimpi ĉi tiun monton. Ĉe ĝia pinto, vi trovos kavernon. Sidiĝu en ĝi kaj de sunleviĝo ĝis sunsubiro ne havu iajn ajn pensojn. Procedu kiel vi deziras, sed ĉesu pensi.”*

Kaj li aŭtoritate ripetis tri fojojn:

*“Vi ne pensu, vi ne pensu, vi ne pensu!”*

*Je la krepusko, revenu al mi kaj rakontu kiel okazis. “*

La sekvan tagon je la tagiĝo, la novico zorgema obei la rekomendojn de sia majstro, trovis la kavernon, kie komforte sidiĝis kaj klopodis por ne pensi. Sed la malo okazis: pensoj atakis lin. Dum li unuafoje provis sidi trankvile en silento, li renkontis grandegan internan bruon. Kaj kion ajn li faris, dum la tuta tago lia menso daŭre produktis pensojn.

Kiam vesperiĝis, elĉerpita kaj tute senkuraĝigita, li malsupreniris por renkonti sian majstron kaj rakonti al li sian malsukceson, timante, ke li estos forpelita. Aŭskultinte, sen montri sentojn tute kviete la majstro diris al li,

*“Tio estas perfekta! Nun mi petas vin morgaŭ matene ellitiĝi tre frue kaj reiri al la kaverno. Sidiĝu kaj de sunleviĝo ĝis sunsubiro, ne ĉesu pensi. Faru kiel vi volas, sed ne lasu iun ajn blankan spacon inter viaj*

*pensoj.”*

*Kaj li aŭtoritate ripetas tri fojojn:*

*“Vi devas pensi, vi devas pensi, vi devas pensi!”*

*Je la krepusko, revenu al mi kaj rakontu kiel okazis. “*

La sekvan tagon li reiris la monton pensante, ke tio estos facila. Sed iam instalitaj en la kaverno, liaj pensoj ŝajnis malrapidiĝi kaj fariĝi pli maloftaj. Kun sia tuta koro, li strebis pensi, nutri ĉiajn ajn pensmanierojn, sed ĉi tiuj rapide malaperis. Ĝis li rimarkis, post iom da tempo, ke silento enŝoviĝis inter liaj pensoj.

Je la fino de la tago li reiris malsupren trovi sian majstron hontigita pro ĉi tiu nova malsukceso. Sed li bonvenigis lian rakonton kaj diris al li kun rideto:

*“Gratulon! Via unua leciono finiĝis! Vi ĵus malkovris la paradoksan naturon de la funkciado de la menso. Ni ne povas devigi ĝin. Kaj se oni provas, ni estos seniluziigitaj de la rezulto.”*

Teksto citita en

*“Ne laissez pas votre vie se terminer, avant même de l’avoir commencée”*

*“Ne lasu vian vivon finiĝi, eĉ antaŭ ol vi komencis ĝin”,*

D-ro François Bourgonon, First Éditions, 2019, p. 42-44.

Bernard skribas:


*Mi jam legis en franca “L’ordre du jour”, de Éric Vuillard, Actes Sud, 2017, Prix Goncourt 2017. Mi ŝatis.*

*Jean-Claude Roy esperantigis ĝin: Tagordo, Eldonejo ZA Editions, 2018, <https://z4editions.fr/publication/tagordo/>*

*Mi mendis la esperantan version ĉe la libro-servo de UEA kaj ricevis ĝin la 5-an de Majo 2020. Mi do relegis ĝin en Esperanto hieraŭ kaj ĉi-matene. Bona libro.*

Jen la kvara paĝo de la kovrilo

Dudek kvar ili estis, apud la mortaj arboj ĉe la riverbordo, dudek kvar nigraj, brunaj aŭ konjakkoloraj surtutoj, dudek kvar paroj da ŝultroj lanremburitaj, dudek kvar tripecaj kostumoj, kaj la sama nombro da pantalonoj kun pinĉofaldoj kaj larĝa orlo. La ombroj penetris en la grandan vestiblon de la palaco de la Asemblea prezidento; sed baldaŭ ne plu ekzistos Asembleo, ne plu ekzistos prezidento, kaj, post kelkaj jaroj, eĉ ne plu ekzistos Parlamento, nur amaso da fumantaj ruinoj. EV



## Gaja aktiva semajnfino

23a - 25a oktobro 2020

Rottweil



Rottweil estas la plej antikva urbo de Baden-Virtembergo, sed ĝi havas unu el la plej novaj allogaĵoj:

246 m altan turon kun la plej alta panorama platformo de Germanio. Ĝi estis konstruita de firmao Thyssenkrupp por testi liftojn. De oktobro 2017 ĝi akceptas vizitantojn.

Jam la ekstera aspekto estas interesa: ĝi estas kovrita per teksaĵo, kiu donas tute diversajn impresojn depende de la taga lumo. Ene de la turo

**Urbocentro de Rottweil kun rigardo al la nova turo preskaŭ finkonstruita**

okazas eksperimentoj pri liftoj: kelkaj liftoj povas plurope okupi la saman ŝakton. Kiel? Tion vi ekscios surloke, ĉar en la dimanĉa mateno ni esploros tion dum komuna ekskurso. Sed ne nur la liftoj estas interesaj, eĉ la konstruado de la turo mem montras plurajn rekordojn (Vi povas spekti tempoakcelitan kvarminutan filmeton pri tio: [youtube.com/watch?v=j3Sk1CdVdyk](https://www.youtube.com/watch?v=j3Sk1CdVdyk)).

Dum la sabata posttagmezo okazos la tradicia ekskurso: ni iros al la urbo, kiun la romianoj fondis en la jaro 73 p.K. Sed ĉi-tiu ekskurso estas aparta: ĉar ni sukcesis dungi de la urbo oficialan ĉiĉeronon, kiu rekte ESPERANTLINGVE gvidos nin tra la historia urbokerno. - Ambaŭ ekskursojn gvidos la profesia ĉiĉerono pri la urbo kaj la turo, nome Christoph Frank. Do vi jam povas antaŭĝoji kompetentan gvidadon al interese kaj vidindaĵoj.

Ĉe tiom da kulminoj ankaŭ la kursoj havu kulminojn, tial ni proponas denove la formon de Gaja Semajnfino: en la centro de la aktivadoj estu **viaj interesoj kaj talentoj** kaj via iniciato. Eble vi intense okupiĝas pri iu temo, ĉu historia, ĉu biologia, ĉu astrofizika, ĉu metia, ĉu medicina, ĉu ĉu ĉu ... - jen la longe atendita ŝanco paroli pri ĝi. Eble vi ŝatas muziki aŭ kanti aŭ prezenti ... Kion ajn - vi estas bonvena dividi tion kun ni.

Do, krom por la plej bazaj komencantoj la „kursoj“ ne okazos en la klasika formo kun nur unu instruisto kaj la aliaj ĉiuj lernantoj, sed en formo de interkolega prezentado.



La aranĝo okazas en la Junulargastejo de Rottweil

**DJH Jugendherberge Rottweil**

Oberamteigasse 13, 78628 Rottweil

(Koordinatoj: 48,1688 N, 8,6240 E)

Tel: +49 (0) 7621 47040

[rottweil.jugendherberge.de](http://rottweil.jugendherberge.de)



### Programskemo

#### vendredo, 23a oktobro

17:00 - 18:00 alveno, aliĝo, ekloĝado, pliaj informoj  
18:00 - 19:00 bonvenigo kaj vespermanĝo  
19:00 - 20:00 unua kunveno, anonctabulo pri deziroj prezenti  
ekde 20:15 vespera programo, poste knajpo

#### sabato, 24a oktobro

07:30 - 08:30 matenmanĝo  
09:00 - 11:45 interkolega prezentado  
12:00 - 13:00 tagmanĝo, poste urbopromeno kun Christoph

18:00 - 19:00

19:15 - 20:15

ekde 20:30

vespermanĝo

prezentado de libroj

vespera programo, poste knajpo

#### dimanĉo, 25a oktobro

07:30 - 08:00

08:15 - 09:00

09:00 - 09:45

10:00 - 11:15

12:00 - 13:30

matenmanĝo KAJ redono de ĉambroj

ekmarŝo al *LA TURO*

prezentado de Christoph Frank en la turo:

„Magia vojaĝo pri la evoluigo de liftoj“

liftumado kaj vizito de la plej alta elrigardo-

platformo de Germanio

tagmanĝo, adiaŭo



**Aliĝilo** (sendu al: Inge.Simon@esperanto.de, 07361/ 360 615)

<http://esperanto-bw.de/seminario-eo>

### Memfaritaj „kursoj“

- Mi ŝatas mem paroli pri \_\_\_\_\_ \*
- Mi havas intereson, aŭdi aŭ interparoli pri \_\_\_\_\_ \*

\* (daŭrigu sur aparta folio)

### Kostoj:

Kotizo: 30 € (por junuloj sub-30-jaraĝaj: 15 €).

Du noktoj kaj ĉiuj manĝoj en la junulargastejo:

en 4-lita ĉambro 80 €

en 2-lita ĉambro 100 € (tre limigita kvanto)

- Mi volas partopreni la eniron+gvidadon de la turo  
(kostoj 15 €, ne repageblaj)

La aliĝo validas post alveno de via kompleta pago sur nia konto:

**BAVELO-Konto** IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22

BIC: SOLADES1VSS (Sparkasse Schwarzwald-Baar)

- Mi ĝiras \_\_\_\_\_ € al la **BAVELO-Konto**

**IBAN:** DE21 6945 0065 0010 4179 22 - **BIC:** SOLADES1VSS .

### Mi volas dormi en ...

2-lita ĉambro  ve/sa  sa/di

4-lita ĉambro  ve/sa  sa/di

- Mi serĉas pli komfortan tranoktadon kaj petas helpajn informojn pri tio.

### Manĝoj en la junulargastejo:

- vegetare  alergio kontraŭ \_\_\_\_\_

### Nomo, adreso, tel.n-ro kaj retadreso, subskribo

---



---



---



---

Nia kasisto pretas peradi viajn pagojn al **BAVELO**  
Tiam eblas pagi per ĝiro aŭ reta ĝiro al  
CCP Esperanto France-Est 1997 72 W Nancy  
IBAN: FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150  
BIC: PSSTFRPPNCY

Aŭ per franca ĉeko al Esperanto France-Est  
sendata al nia kasisto  
Bonvolu informi pri la celo de via pago al jena  
ret-adreso: andreo.ag15@sfr.fr

## Esperanto-Novaĵoj el Baden-Virtembergo

### Spite al la koronaviruso la grupa Esperanto-vivo pli kaj pli buntas

La lokaj Esperanto-grupoj estas aparte forte frapitaj per la ekonomia fermo pro la koronaviruso. Aliflanke la virtuala Esperanto-mondo momente montras tute novajn facetojn, eĉ pli buntajn, eĉ pli interesajn.

En Baden-Virtembergo minimume du grupoj, *obstine kaj virtuale* daŭrigas siajn kunvenojn: **Stuttgart** (2-foje monate: je la unua lundo kaj je la tria mardo, ambaŭ je la 19a30 per *Jitsi*) kaj **Freiburg** (ĉiusemajne, ĉiam lunde je la 20a per *Skajpo*).

Kio estas aparte interesa pri tiaj, *kunsidoj*? estas pli kaj pli internacia partoprenado en tiaj video-konferencoj. Ekzemple en Freiburg jam partoprenis homoj el Francio, Italio, Hispanio, Pollando, Irano kaj Anglio. Por ke **vi mem** ricevu inviton, bv. skribi letereton al Julia. Noe<@esperanto.de

Se vi volas viziti unu el tiaj virtualaj renkontiĝoj, vi konsultu la retpaĝon <[eventaservo.org](http://eventaservo.org)>. Tie vi trovos ĉiujn bezonatajn informojn, ĉu kaj kiel aliĝi kaj kiam kaj kiel partopreni virtualan renkontiĝon.



## Tertremo en Zagrebo

Karaj gesamideanoj,

Nia gazetoj nun plenplenas de malbonaj novaĵoj pro tiu aĉa viruso. Tamen ekzistas iuj, ne tiel for de ni, kiuj suferis plian malfeliĉon:!!! Temas pri la ZAGREBANOJ. Niaj televido kaj radioj nur supraĵe informis pri la tertremo, kiu tremigis la ĉefurbon de Kroatio. Jen mesaĝo de Spomenka Ŝtimec, kiu ja agrabligis la printempa staĝon en Rimlishof apud Guebwiller en 2018. Pensu pri niaj tieaj gesamideanoj!

***Kiel fartas esperantistoj post tertremo en Zagrebo la 22an de maro 2020, jen mia sperto:***

***Mi loĝas en la urbocentro de Zagrebo en la strato Nova ves, tre malnova strato de Zagrebo el la mezepoka tempo. La unuaj tertremoj estis du, la unua je la 6. 24 kun intertempo de ĉirkaŭ duonhora venis la dua, iom malpli forta. . Ni aŭdis fortegan bruon kaj tuj post ĝi venis skuegoj en kiuj mi flugis de la lito. La bruo ne venis nur de la tertremo sed tute aparte de frakasitaj glasoj (jes, miaj belaj verdaj alcazaj glasoj, el ses, la tertremo ŝatis detruiri kvin, ĉampanaj glasoj aldone, glasoj por glaciaĵoj, japanaj teleroj kaj ceramikaĵoj, tekruĉoj kaj vinkruĉoj, ĉio muelita en polvon ĉar la puŝo de la tertremo elĵetis ilin el mia kuireja ŝranko.) La tertremo ĉe mi odoris je kuba rumo, ĉar frakasiĝis plena botelo da blanka rumo kaj aspergis la polvon.***

***La domoj en la strato estas ege trafitaj kaj multaj domoj estas damaĝitaj. Dum la matena tertremo la 22an de marto ĉiuj loĝantoj elkuris surstraten en malvarman matenon en noktoĉemizoj kaj kovriloj kaj kun la piedoj sur la tero forgesis por momento korona-viruson. Mi havis nian maskon survizaĝe, mi havis gantojn. Post la unuaj tertremoj... ĝis hodiaŭ atakis nin 90 tertremoj malpli fortaj. Se iu demandas onin: Kiel vi fartas? La respondo estas: Mi fartas 5,50 laŭ Richter***

***Mi estas bonhumora ĉar ĵus mian trietaĝan domon (konstruitan brike en 1930) vizitis arkitektoj, fakuloj pri statiko, du junaj inĝ, kun kaskoj surkape, el 300 kiom nun cirkulas tra la urbo kaj inspektas la zagrebajn domojn. Post kontrolo de la domo, ili decidis glui sur la pordon la verdan etiketon. Kaj tio signifas: la loĝantoj rajtas loĝi en tiu domo. Sed la verda etiketo ricevis noton: necesas kontrolo de kamentuboj fare de fajrobrigadistoj kaj kamenpurigistoj, meze urĝe!***

***Ĉirkaŭ 300 zagrebanoj ne plu rajtas loĝi en siaj domoj, sed ricevis provizoran restadon en Studenta domo.***

***Mi estas kontenta, ke oni hodiaŭ ne ordinis al mi translokiĝon al Studenta domo sed mi rajtas dormi hejme kaj reordigi mian bibliotekon.***

***El ĉiuj esperantaj libroj la plej bonan flugkapablon havis la libro ricevita de So Gilsu „Mi serĉas mian perditan... “***



Esperanto-Centro

***Mi dankas al ĉiuj kiuj interesiĝis kiel ni fartas. Laŭ unuaj pritaksoj, ankau nia Esperanto-Klubo en Vodnikova en la sufiĉe damaĝita zagreba urbocentro fartas bone.***

***Saluton el Zagrebo kiun ni devos rekonstrui dum venontaj jaroj. TAKE havus grandan laboron ĉe ni. Sed unue ni venku koronaviruson kaj tiam ni devos sanigi la vundojn. Granda laboro antaŭ ni.***

***Saluton de Spomenka Ŝtimec***



## Bazaj informoj pri la virtuala AMO 65

*EKO de ILEI kaj UEA*

En junio okazos la sekva virtuala Seminario pri Aktivula Maturigo. Jen la komencaj informoj:

**Dato:** Sabate, la 27an de junio, 2020

**Horoj:** Fiksotaj laŭ la proponoj, sed en la centreŭropa posttagmezo. (t.e. CEST)

**Temo:** "Landaj Asocioj – Leviĝantaj Agantoj"

**Teknika prizorgo pere de Zomo:** La movado en Irano.

**Forumo:** Ni provas kunigi reprezentantojn de niaj kvin kontinentaj komisionoj.

La antaŭa seminario (64) temis pri la Fakaj Asocioj kaj el tio fontis rekomendoj, kelkaj el kiuj estas nun en UEA enkondukataj. Ĝi krome vidigis al ni aktivecon, pri kiu ni ne konsciis. Nun venas la vico de la Landaj Asocioj, kaj la Kontinentaj kaj Regionaj Komisionoj -- Afriko, Ameriko, Azio, Eŭropo kaj Mez-Oriento kaj Norda Afriko (MONA). La horzonoj laboras kontraŭ tiu deziro, sed se ni fiksos la forumon meze de la seminario (ekz. inter 15:00 kaj 16:00 CEST, Ameriko kaj Azio povus partopreni).

Por la cetera programo, ni ŝatus ricevi proponojn de homoj, kiuj pretas fari prelegojn aŭ prezentaĵojn. Ni preferas doni parolvicon al homoj, kiuj ne aperis en AMO 63v kaj 64v. Ni jam havas du proponojn, el interesaj landoj: Britio kaj Bulgario. Bonvenaj estas informoj pri la agado de Landaj Asocioj, aŭ pri la perspektivoj por la Landaj Asocioj. Prelegoj daŭru 30 minutojn, kun 15 minutoj por demandoj kaj diskutoj.

Prelegantoj konsentas liveri al la organizanto sian prelegon en elektronika formo (PDF, PPTX, Word aŭ alia) ĝis la 20a de junio.

La temo eble pli prezentas niajn dezirojn ol la nuna realeco – almenaŭ se ni pensas pri la kontribuo de la Landaj Asocioj ne nur al sia enlanda agado sed al pli vasta kontribuo al transnacia bonfarto.

Ĉiu ajn rajtas partopreni: konataj partoprenintoj el AMO 63 kaj 64 ricevos la alirajn informojn. Novuloj nur petu aliron de mi (stefan.macgill@ce gmail. com).

### AMO 64 – ĉiu prelego ĉe <aktivulo.net>

Ĉiuj ses prezentaĵoj de tiu virtuala seminario pri la Faka Agado legeblas ĉe <aktivulo.net>, sub la rubriko <AMO virtuala>. Temas pri prelegoj de Amri Wandel, d-ro Ilona Koutny, d-ro So Jinsu kaj s-ino Malgosia Komarnicka. Dankon al Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova pro la helpo, kiel same al niaj iranaj kolegoj pro la teknika prizorgo de la seminario!

### SES – rete: tutmonda aliro al Esperanto-lernado!

Kun bedaŭro ni informas vin, ke SES 2020 ne okazos ĉi-jare fizike en Ĉeĥio – kiel antaŭe planite.

Ĝi tamen ja okazos – virtuale kaj tutmonde!

Tiu ĉi SES okazos de la 18-a ĝis 26-a de julio 2020, kaj la ĉefa instruado okazos dum la du semajnfinoj (kun aldona libervola programo inter ili – lunde-vendrede). Kiam ni havos pli da informoj, ni sciigos vin! Ĝis tiam restu sanaj, lernu kaj praktiku Esperanton kaj antaŭĝoju la somerajn virtualajn Esperanto-aranĝojn!



### Alvoko de VEKI por la pedagogia programo

Nia Instruista ligo, ILEI devas kunveni rete en julio anstataŭ ĉeesti ĉiuj kune en Kebekurbo kiel planite. Ni planas vekiĝon, ni planas VEKI, la 53-an Virtualan Esperanto-Konferecon ILEI. Ĝi okazos en la semajno, de la 25-a ĝis la 31-a de julio 2020.

Vidu la program-skizon ĉe [www.ilei.info](http://www.ilei.info). Ni estos kune dum 13 horoj tage, tage kaj nokte, tra la tuta mondo samtempe de Kalifornio ĝis Japanio. En tiu program-skizo aperas tri sesioj en ĉiu tago. La Tago pri Pedagogio okazos la 30-an de julio 2020. Ni planas la sesiojn tiel, ke ĉiu nova kontribuo komenciĝu je plena horo. Do post



prezento, prelego, estos tempo por demandoj kaj debato. La sesio tria, nomita Azia Mateno, de tiu Tago pri Pedagogio, jam havas sian programon.

### Kursoj en Tajlando kaj DR Kongo



Ni alvokas al instruantoj, instruistoj petante, ke ili sendu filmeton kun prelego pri iu el siaj spertoj ĝis la 30-a de junio. Daŭro: 30 min. Sekvos demandoj kaj debato. Ankaŭ povos esti kontribuoj en rekta enreta partopreno; por tio iu prelegonto povas skribi al Elisabeth Le Dru <ledruelisabeth@gmail.com> dirante: "mi pretas paroli je tiu tago je tiu horo"! Bonvenon! Por havi abundan debatan fazon, la formo rekta enreta partopreno estas preferinda.

La temoj de la prezentoj povas esti

1. Nova lernolibro, kiun vi uzas kaj pri kiu vi volus paroli, prezenti ĝin.
2. Preciza sperto dum instruado, kiu estis aparte interesa kaj povos interesi kolegojn.
3. Analizo de iu aspekto de nia lingvo kaj kiel instrui ĝin.
4. Ekzercotipoj, novaj inventaĵoj viaj.
5. Legolibro, kies legado aparte ravis vian klason.
6. Viaj bezonoj kiel Eo-instruisto
7. Viaj plej utilaj fontoj kiel Eo-instruisto
8. Via uzo de Juna Amiko en via instruado

Sinjorino Le Dru kaj mi estas je dispono por respondi viajn eventualajn demandojn

Mirejo Grosjean

### INFORMOJ PRI VENEZUELO (majo 2020)

La tiel nomita "Bolivar-devena Revolucio" estas unu el la plej grandaj mensogoj de la XXI-a jarcento: mi diras tion kiel maljuna, multjara veterana 81 jara maldekstrulo. Ĝi ne estas revolucio nek socialismo, sed ŝtatcentrita lumpenfikapitalismo. La senlimaj korupto kaj malkompetenco, eĉ laŭ hierarkuloj de la reĝimo, daŭre superregas; samkiel ia naŭzega aŭtoritatismo kaj kreskanta mistraktado al ĉiuspecaj disidentoj. Ili tamen intencas ĉiutempe kaj ĉiuloke vendi la ideon, ke sia fuŝsocialismo reprezentas la ununuran opcion de estonta feliĉo por la homaro, la solan veran utopion por la planedo.

Mi konsideriĝas modeste malvara kaj akceptema je diverseco de pensmanieroj. Tial mi rekonas la pli-malpli adekvatan kapablecon de la Maduro-registaro kontroli en Venezuelo la kronvirus-

pandemion. Ili estas ricevantaj kun apertaj brakoj milojn da venezuelaj elmigrintoj, kiuj nun revenadas el najbaraj landoj. Mi ankaŭ malakceptas la maljustajn ekonomiajn sankciojn far Usono kaj ĝiaj aliancanoj. Ĉiel-ajn la situacio de nia amata patrujo ne estas eltenebla.

Kaj kial? la precipaj problemoj de nia lando ekkomenciĝis antaŭ longe kaj multe pligraviĝis sub Maduro je la prezidenteco de la Respubliko. Nia hiperinflacio estas la plej alta en la universala historio kaj nur en Venezuelo ekzistas-almenaŭ en la amerika kontinento-la koncepto de nula salajro por la plejmulto (80%) de la loĝantaro; tio estas pli malmulta ol kvin dolaroj (\$5) monate. Mi mem, kiel titulara universitata profesoro gajnas apenaŭ dudek dolarojn (\$20) ĉiumonate. Eĉ la tre modestan manĝ-skatolon neregule sendatan nur al kelkaj sektoroj de la loĝantaro mi ne ricevas. La malkosteco, eĉ senpageco, de kelkaj-ĝenerale tre-

mezbonaj publikaj servoj ne kompensas la mankon de kontanta mono kaj minimuma aĉetpovo. Seriozaj analizistoj pritimas venontan malsategon jam post kelkaj monatoj. Sed Maduro kaj lia ĉirkaŭaĵo ŝajnas nenion kompreni kaj ne ekzistas-jam de longa tempo-politika volo enkonduki signifajn, ne-"gatopardajn" ŝanĝojn en la sensukcesan ekonomian modelon, kiu restas por tiuj fanatikuloj perfekta kaj netuŝebla.

Finfine, oni povus multon aldoni, sed necesas rondigi ĉi tiun leteron.

Jen mi estas en mia hejmo kvazaŭ enfermata dum, kiu scias kiom da tempo, konsumante mian etan ŝparmonon. Ĉio vendiĝas kaj aĉetiĝas per dolaroj, sed mi ne havas aliron al fremdaj devizoj, kune kun la plejmulto de nia popolo. Al mi mankas mono eĉ por aĉeti la plej elementajn medicinaĵojn. Nuntempe mia komputilo, kun sia printilo estas difektita; la teknikisto enspezas (multe da) dolaroj kaj: aldone, mi ne rajtas eliri el mia domo, nek maskon portanta. Tiel mi estas kondamnata aŭskultadi la eternajn, longegajn, arogantajn kaj ĉiam cinikajn ĉenparoladojn de Prezidento Maduro.

Sed tio ne estas ĉio. Nek Nikolás Maduro, nek la ekstremista opozicio deziras dialogon, nur monologon foje maskitan per ŝajna dialogo. La memnomumita alterna prezidento Juan Guaidó revadas pri usona kaj usongvidata milita invado al nia lando, kio ankaŭ estus fatala. Sed ĉiukaze ni estas jam invaditaj de neregulaj grupoj, gerilistoj kaj "paramilitaroj" edogenaj kaj alilandanaj. Tio evidentiĝas precipe en la tiel nomita "Mina Arko" (Arco Minero) en la sudo de la lando. Laŭleĝaj kaj kontraŭleĝaj ministoj detruadas malkompateme la praan medion kun ĝiaj kreitaĵoj: la arbarojn, la riverojn kaj aliajn akvofontojn: profite al plurnaciaj entreprenoj rusaj, ĉinaj, usonaj, kanadaj, iranaj, - 1 - sudafrikaj, turkaj kaj multaj aliaj en impona lavango geopolitika.

Kiam kaj kiel finiĝos ĉi-tiu pandemio? Maduro ŝajnas tre memcerta dirante: " Nia revolucio estas pacema, sed bone armita per fusiloj, kanonoj kaj misiloj; sekve ni pluarmiĝos por eliri triumfintaj el ĉiujn milita konflikto. Nia sola modelo baziĝas sur fortika unio civitana-milica- policana. Dio laŭdatu!" Ni ĉiuj, kiuj jam ne estas infanoj, perfekte scias, kio estas policana ŝtato, ĉu faŝisma, falangisma, nazia aŭ stalinisma. Nia plej taŭga kaj trafa respondo estus; ĉio tio konsistigas la plenan antitezon de la Zamenhofa Interna Ideo de nia amata Esperanto.

**LA SANKCIOJ NE ESTAS LA SOLVO: PACON KAJ PANON POR VENEZUELO!  
NI POSTULAS RESPEKTON POR NIA KONSTITUCIO!  
NI VOLAS EKOPOLITIKON ANSTATAŬ GEOPOLITIKO!  
NI SAVU LA INDIĜENAJN POPOLOJN KUN ILIAJ MEDIOJ!**

#### POST-SKRIBAĴO:

Estas vere malfacile analizi iun ekstreme kompleksan politikan proceson kaj samtempe partopreni je tiu kiel socia subjekto. Do, nur kelkaj tagoj post fininta mian leteron, okazis abominenda atako al venezuelaj marbordoj, far teroristoj-kelkaj el ili usonaj - kiuj intencis kidnapi la Prezidenton aŭ murdi lin, preni iujn strategiajn lokojn en kaj apud Karakaso, inter aliaj fiagoj; sed ili rapide malsukcesis dank'al bona funkciado de nia ŝtatdefenda aparato.

Mi kompreneble aplaŭdas la malvenkon de tiuj banditoj; ankaŭ la popolanoj kunlaboris, ĉar temas pri la integreco de la Patrujo. Sed ĉi-tiu Pirha venko ne solvis la problemojn de nia lando. Jam la sekvantan tagon, iuj kanajloj penetris ĝis la ĝardeneto de mia hejmo, ŝtelante la ununuran komputilon, kiun ni, loĝantoj de la domo, ankoraŭ posedis. Hazarde, el ni neniu estis sur la scenejo, alie la krimuloj estus povintaj nin masakri; tia estas la nesekureco, la senpuniteco hodiaŭ en nia amata Venezuelo: lando preskaŭ sen minimume akcepteblaj servoj de akvo, de elektro, transporto, bankumo, interreto; eĉ sen benzino. Nia petrolo estas malmulte produktata, malbonkvalita, senvalora, lastatempe maljuste sankciita de Usono. Ni pretendas kaj jam komencas vendi precipe oron kaj diamantojn, sed ankaŭ koltanon, baŭksiton, feron, kupron, inter aliaj mineraloj, je prezoj de magra kokino, nur por pagadi ŝuldojn nemezureblajn!


Maduro kun sia reĝimo neniam kapablos aranĝi tion, sed ni ankaŭ malhavas seriozan, demokratian opozicion unuiĝintan.

ĈI-MOMENTE NUR LA ESPERO RESTAS KUN NI.

HOMO INTERCULTURALIS - 2 - - 3 -



## Ni lernu per enigmoj kaj humuraĵoj



G.J.

En urba biblioteko du virinoj babilas, unu rakontas:  
*"Mia edzo decidis forigi de la bretaro de sia laborĉambro kelkajn malnovajn librojn, fakte neniam legitajn kaj tre verŝajne ankaŭ neniam legotajn. Li eĉ opiniis, ke iuj legemuloj volonte ilin prenos donace. Tial mi metis sur la trotuaron antaŭ nia domo seĝon kaj sur ĝin dudekon da libroj. Mi eĉ metis karteton kun la mencio: "libere forpreneblaj"*

- Kaj kio okazis?

**-Vespere ĉiuj libroj kuŝis sur la trotuaro kaj la seĝo estis for!"**

En lernejo la geknaboj pozas por la foto de la ĉi-jara klaso. La instruistino instigas ilin aĉeti ekzempleron por memorigo per jenaj vortoj.

*"En fora estonto, vi ĝojos rigardi tiun foton kaj montri la diversajn vizaĝojn al viaj propraj gefiloj... jen ĉi-tie straras Roberto, nun kuracisto! Apud li, jen Paola, nun estrino de grava firmao. Kaj malantaŭ ŝi Alberto, li iĝis inĝeniero pri informadiko kaj formigris al Japanio!"*

Post iom da silento, aŭdiĝas eta voĉo en la klasĉambro:

**"Kaj jen tute dekstre staras nia instruistino. Ŝi forpasis antaŭ iom da jaroj!"**

La patro kutimas rakonti ĉiuvespere anekdotojn al sia fileto por faciligi lia endormiĝon.

Post duonhoro la patrino malfermas la pordon de la ĉambro, kie estas mallumo...

Ŝi mallaŭte demandas;

*"Ĉu li sukcesis endormiĝi?"*

Tiam respondas tute malaŭte infana voĉeto:

**"Jes, panjo...nun finfine paĉjo dormas!"**

### HORIZONTALE:

1. Muskol' de la femuro.
2. Monunu' de Bulgario. Herb' uzata kiel nutraĵo por ĉevaloj.
3. INVERSE: estintec'. Malvera opini'.
4. Interkonsent' pri iu negoco.
5. Talisman'. Koro de duelo.
6. Okupanta vico post 999 aferoj. INV: opozicii.
7. Ne surhavanta la nomon de la aŭtoro.
8. Ses sen koro. Kodo sen vokalo. Membr' ĉe la homo.
9. INVERSE: fabrikada vivulo. Gado sen kapo.
10. Amfibio. Nedividebla er' de materio

### VERTIKALE:

1. Klef'. Multnombra kolekto.
2. Malnova Londona kvartal'.
3. Tro ŝparema homo. Bleko de azeno.
4. Litseĝ', kiun servistoj portas sur la ŝultroj.
5. Litera nomo. Partikulo. Esti en bona ordo, sed inverse!
6. Sent' de honoro.
7. Adepto de la caro. Centra part' de rado.
8. Amasa forlaso de okupata loko. Ronĝul'.
9. Akirado de scioj.
10. Regnokodo de Senegal. Aparato. Interpunkcio signo

### Inter maljunuloj

Tiu virino sidis en la atendejo por sia unua rendevuo ĉe nova dentisto. Sur diplomo afiŝita en la atendejo, ŝi povis legi lian nomon kaj tiam rememoris pri sia samklasano en la liceo antaŭ 40 jaroj, al kiu ŝi eĉ iom enamiĝis. Ĉu vere la sama homo?

Enirante la prizorgejon, ŝi tuj komprenis, ke ne. Tiu viro tute griz-hara preskaŭ kalva ja estas tro maljuna por esti ŝia tiama sekreta sopirato.

Tamen post la flegado de ŝia dento, ŝi kuraĝis demandi:

*"Ĉu vi frekventis la liceon Lamartine?"*

- Jes

- En kiu jaro vi abiturientiĝis?

- En 1972. Kial tia demando?

- Ĉar vi ja estis en mia klaso"

Tiam la dentisto aŭdacis maldece demandi:

**"Kaj pri kiu fako vi estis profesorino?"**

### SOLVO KVE 189

#### Horizontale:

- 1.BALUSTRADO. 2.REAKCI. RIT. 3.AR. REBAT. 4.MEKANIKIST'.  
 5.ATRI. OSLO. 6.ANS. IERK. 7.INKI. KORBO. 8.SRO. LAMIOJ.  
 9.MOVADO. ANO. 10. ODOR. SUNOT.

#### Vertikale:

- 1.BRAMANISMO. 2.AERET. NROD. 3.LA. KRAKOVO. 4.UKRAINI.  
 AR. 5.SCEN. LD. 6.TIBIO. KAOS. 7.AKSIOM. 8.ARTILERIAN. 9.  
 DI. SORBONA. 10.OTUT. KOJOT.



Iu patrino provas dormigi sian filineton, sidante ĉe la rando de la lito, ŝi dolĉe kantas ĉarman lul-melodion. Tiam ankaŭ duan kaj eĉ trian ....

Tiam la infaneto demandas:

"Panjo, ĉu nun mi rajtas ekdormi? aŭ ĉu vi eble deziras ankoraŭ plukanti!"

Ĉasisto rakontas al sia amiko: "Mia hundo strange kondutas. Ĉiufoje, kiam mi pafas kaj maltrafas, tiam ĝi levas la piedojn kaj eĉ ridegas.

- Kaj kion ĝi faras, kiam vi efekti ion trafas?

- Tion mi ankoraŭ ne spertis, ĉar nur de tri jaroj mi havas ĝin"

"Saluton Petro, ĉu mi konfesu al vi, ke baldaŭ mi iĝos patro

Sed vi aspektas tute malgaja, kial do?

Efektive, komprenu, mi ankoraŭ ne informis mian edzinon."

## Karlo de Edmond Privat dekkvina ĉapitro: La sekreto de Karlo



Ĉiudimanĉe la familio Davis iris al la ĉefpreĝejo, matene je duono post la deka. Ĝi estis tre malnova katedra preĝejo, ekkonstruita en la centjaro de la imperiestro Karlo la Granda.

Dum la orgeno eksonis laŭtege, ĉe la komenco de l' diservo, Karlo sidiĝinte apud siaj gepatroj okule serĉadis iun sur la benkoj antaŭ si. Li estis maltrankvila ĝis li rekonis blondan hararon kun blua rubando, kiu ĉiudimanĉe aperis tie.

Lumigata de sunradio falinta tra la koloraj vitraĵoj, la blonda hararo brilis kvazaŭ oro inter la nigriĝintaj kolonoj de l' antikva templo. Tiu vidaĵo trankviligis la animon de Karlo, kaj post la preĝoj li ne movis plu siajn okulojn dum la tuta predikado de l' pastro. Post la diservo Karlo kutime zorgis por vidi la junulinon elirantan; kaj ĉiufoje li konvinkiĝis, ke ŝi havas belege blujajn okulojn.

Iam promenante tra l' artmuzeo kun amiko, li vidis ŝin admire starantan antaŭ pentraĵo de itala majstro. Li kompreneble haltis antaŭ la sama. Ŝi tre ruĝiĝis; sed de tiu tempo, ĉiudimanĉe ili ofte ekrigardis unu la alian elirante el la ĉefpreĝejo. Ŝi ĝenerale estis sola kun sia patrino, sed kelkafoje ili salutis kaj alparolis alian sinjorinon, kiu eliris el preĝejo kun kvar gefiloj.

Karlo iam aŭdis ŝin diri al ili: "Vi do venos ludi en la Nacian Parkon hodiaŭ posttagmeze, ĉu ne?" Post iom da pripensado Karlo decidis, ke ankaŭ li iros al la parko posttagmeze. Tie li havis mirindan ŝancon, ĉar promenante apud la ludkampo, li dufoje havis okazon redoni al ŝi pilkon falintan sur la vojon aŭ perditan sub arboj. Ŝia rideto kaj danko lin strange konfuzis. La postan dimanĉon, li sekvis ŝin de malproksime por vidi, kie ŝi loĝas. Tio estis ekster la urbo sur strato bordita de arboj kaj ĝardenoj. Ŝi eniris en kastelforman dometon kun belega flor-ĝardeno plena je rozoj.

Karlo jam ofte rimarkis tiun domon antaŭe, sed ŝajnis al li, ke ĝis nun ĝi ĉiam estis fermita; kaj li kredis, ke ĝi estas ne luita.

Kredeble ŝia familio ĵus luis aŭ aĉetis la domon.

De tiam Karlo ofte vagadis ĉirkaŭ tiu loko, esperante ŝin ŝance ekvidi. Unu vesperon li vidis ŝin promeni kun ŝia patro en la ĝardeno. Alian fojon li aŭdis ŝin kanti tra malfermita fenestro. Tio lin feliĉigis por multaj tagoj.

Jam lia fratino kaj liaj kolegoj ĉe la gimnazio multe miris pri lia ofta revemeco.

Unu tagon li trovis ŝian domon tute fermita. Teruran baton li ricevis en la koro.

Reveninte la morgaŭan tagon li same vidis. Ŝi eble forveturis kun la tuta familio.

Sed kien? En la ĝardeno kelkaj nigraj birdoj pepante interbataletis. Karlo jam kredis, ke lia tuta vivo estas ruinigita.

Li decidis diri al Janko sian sekreton kaj peti lian helpon.

## Informoj ricevita de Manfred Westermayer pri Inna Valeŝkovskaja

Inna Valeŝkovskaja havas gravan malsanon de sia sango-sistemo, jam en novembro ŝi komencis viziti kuracistojn kaj klinikon en Odessa kaj ankaŭ en Kievo.

Tatjana Aŭderskaja skribis: "ŝia stato malpliboniĝas: en la lastaj analizoj troviĝas jam 15 trombocitoj anstataŭ 170 kiel ĉe mi! Kaj neniu povas diri kial!"

Mi kontaktis Tatjana kaj rekte ankaŭ Inna, ŝi estas 34 jara, kun ŝia edzo Kolja apartenas al la Esperanto-grupo de Tatjana en Odessa.

Intertempe ŝi havas tutan gamon da analizoj, tamen mankas diagnozo.

Mi kontaktis la haematologian instituton de la Universitata Kliniko en Freiburg, kie troviĝas ankaŭ departemento IMS - "International Medical Service". Ili ankaŭ ofertas servojn por ruslingvanoj.

**Por ne tute perdi la esperon kaj ŝian vivon**, mi transprenas la kostojn de 450 eŭroj por komenca traktado - studo de analizoj kaj 20-minuta telefonado/skajpado kun specialisto. Tio eblas dum Inna restas en Odessa. Ni supozas, ke sekvos pluraj laboroj/analizoj kaj tio kostos denove - mi esperas, ke ne pli ol 4 mil eŭroj.

Intertempe ŝi ricevis transfuzon de sango, do feliĉe ne tiom urĝas. Dank'al Ramon Perera ŝi ricevos diagnozon de specialisto en Barcelono. Poste ni vidos, kio eblas kaj ili decidus por stabiligi la sanon de Inna. Mi esperas.

Pro tio **mi petas vin**, se vi povas partopreni je tiuj kostoj, kiujn nek ŝi kun la edzo, nek mi povas porti. En tiu kazo mi petas transpigi al mia persona konto ĉe Volksbank Freiburg:

IBAN DE31 6809 0000 0007 8681 11, BIC GENODE61FR1

Mi resendos (parton de la mono) se ni ne bezonas ĉion. Se vi timas, ke temas pri "falsaĵo" aŭ trompo, **bonvolu alvoki min por priparoli** - se mia edzino estas je la telefono ŝi nur iomete parolas Esperanton.

Mia adreso:

Dr. Manfred Westermayer

Kandelstr. 62

DE- 79194 Gundelfingen (Germanio)

Mia telefono-nro: +49 761 584854, ankaŭ eblas skribi al mia WhatsApp: +49 151 598 427 16 (sed kutime ĝi ne estas aktiva).

Anticipan dankon - Inna, Kostja, Tatjana - kaj mi, Manfred Westermayer (sekretario de AVE: verduloj.org )



Jen ŝi - okaze de Aroma Jalta en la jaro 2002, prenita el la libro de Tatjana "luĉije dni - feliĉaj tagoj", p. 161, kie Inna skribis pri tiu tradicia okazaĵo.

## Aŭskulteblaj voĉoj en Esperanto per tiuj podkasto

En la retpaĝo <http://punkto.info> kuniĝas podkasto kaj aliaj retaj projektoj

Preskaŭ ĉiusemajne aperas nova episodio de la podkasto kern.punkto pri io ajn en Esperanto, sed ne pri Esperanto. Jen la lastaj temoj:

- KP175 Kristiano - La libera urbo ene de Kopenhago, ĉefurbo de Danio
- KP176 Kvinjariĝo - Tempo por resumi kaj rigardi antaŭen
- KP176 Kvinjariĝo-Tempo por resumi kaj rigardi antaŭen
- KP177 Pasvortoj-Pasvortoj kaj pli modernaj rimedoj por protekti sian ciferecan identeco
- KP178 Vulkanoj-Montoj kiuj kaŭzas detruon kaj samtempe fruktodonan grundon por la vivo
- KP179 Epidemioj-Superrigardo pri la scienca esplorado de epidemioj
- KP180 Pandemioj-Dua parto de nia parolado pri epidemioj kaj pandemioj
- KP181 Kosma leĝo-La reguloj eksterteraj

Pliajn episodiojn vi povas trovi en la arkivo: <https://movada-vid.punkto.info/arkivo/>

Kelkfoje okazas tujaj elsendoj. Pliaj informoj: <http://movada-vid.punkto.info/tuje>

Ĝuu la aŭskultadon hejme aŭ survoje.

## Niaj afrikaj amikoj jam trafitaj de la nova krono-viruso.

En aprilo, mi ricevis foton, kiu ege ĝojigis min, kvankam ĝi devenis de lando, kies loĝantoj malfacile luktas kontraŭ virusoj.

Temas pri esperantista familio de Goma, la ĉef-urbo de Nord-Kivu-o, apud Ruando. La foto montras la patrinon, kiu kudras vizaĝajn maskojn por siaj familianoj kaj por geamikoj. Terura epidemio! Kial do, tiu foto ĝojigis min?

Ĉar ĝi montris, ke ŝi uzas malnovan kudro-maŝinon Singer:

Nia asocio Klubo Esperanto de Saint-Etienne estis sendinta du kudro-maŝinojn kaj diversajn ilojn al ili antaŭ pli ol 15 jaroj! Tiam, ni sukcesis pagi la transporton per aviadilo (iom kosta...) dank'al *mon-apogo* de la Ĝenerala Konsilantaro de la departemento Loire, kie ni loĝas. (Ĝi repagis al ni la koston post prezentado de fakturo).

Sed poste, en la vilaĝoj apud la urbo Goma, estis plago: milicanoj de diversaj flankoj, ŝteladis, mortigis homojn, seks-perfortadis virinojn! Preskaŭ la tuta materialo sendita de ni estis tiam ŝtelita aŭ detruiĝinta de pafitaj kugloj. Do, kun ĝojo, ni malkovris ke **tiu malnova maŝino plu funkcias!** Fakte ĝi estas malnova, sed tamen funkcia per elektro (ne per rimeno kaj pedalo). Kaj zorge bon-tenata. Fakte, estas ĉiam pli facile bon-teni maŝinon kun simpla tekniko ol modernegan kun kompleksaj elektronikaj programoj.



**Foto 1: Françoise kudras**

Fonto: aŭtoro



**Foto 2: Hubert en ĝardeno en 1995** Fonto: aŭtoro

En tiu regiono estas multaj esperantistoj, almenaŭ de 30 jaroj. Persone, mi havis la unuan kontakton en 1987 kun juna afrikano de Zairio (tiel nomiĝis la lando RDC sub Mobutu). Li estis sendinta korespondo-peton, kiu afiŝe aperis dum la kongreso de SAT en Bulonjo ĉe maro.

La tieaj loĝantoj ne rifuzas helpon, ni ja estas ĝenerale pli riĉaj ol ili! Sed antaŭ ĉio, ili klopodas elturniĝi por mem trovi viv-rimedojn. La regiono ĝuas ekvatoran klimaton, kie facilas kultivi. Mia amiko Hubert (edzo de Françoise) kreskigis fazeolojn en ĝardeneto. Sed poste, pro la konstantaj bataloj devis rifuĝi en Goma kun familio.

Vere, la situacio post la genocido en Ruando (1994) neniam estis sekura! Kaj bedaŭrinde la nacia armeo (RDC)

malmulte oponis.

Plie estas tie ankaŭ soldatoj de UNO "Monusco". Sed ili utilas al nenio, kaj pli kaj pli la loĝantoj malamas ilin, ĉar ili protektas neniun, krom en la urbo kie viv-nivelaj diferencoj estas okul-frapaj.

Bedaŭrinde en tiu regiono estas multaj riĉaj ercoj: kobalto, koltano. Tiu-ĉi estas uzata grand-skale de internaciaj kompanioj por produkti poŝ-telefonojn, (pli precize *kompufonojn*<sup>1</sup>) kaj komputilojn.



**3/ Mapo de Ruando: Goma situas maldekstre apud la limo, ĉe la lago Kivu (mapo post la genocido de 1994)**

Fonto: <http://www.bisesero.net/pages/l-enquete/cartes.html>




Riĉaĵoj allogas rabistojn. Tial plu ekzistas kaj plagas tiaj milicoj, je la servo de apuda lando aŭ de si-mem, ekspluatante la laboron de junaj geknaboj.

Kaj de pli ol 20 jaroj por terurigi la loĝantojn, la milicanoj sisteme seks-perfortas virinojn, renkontitajn en kampoj. Temas pri longdaŭra praktiko de kolektiva seksperforto kaj mutiladoj.



**Foto 4: Aŭtomobiloj de Monusco sur strato**



**Foto5: Dum Ebola epidemio en Goma en 2019**  
Foto sendita de loka esperantisto

La fama **doktoro Mukwege** agadas delonge en Bukavu (sude de Goma) por flegi, kuraci la virinojn. La homoj tie nomas lin "*la homo kiu riparas virinojn*". Pro lia agado, li ricevis en 2018 Nobel-premion pro Paco, kun Nadia Murad. Espereble, li ne estus ĝin ricevinta, kio signifus, ke li ne bezonus kuraci seks-perfortitajn virinojn! [https://eo.wikipedia.org/wiki/Denis\\_Mukwege](https://eo.wikipedia.org/wiki/Denis_Mukwege)

Kiel scias la legantoj, en Afriko pluraj landoj estis trafitaj de gravaj epidemioj. La antaŭ-lastata nomiĝas **Ebola** kaj frapis okcidentajn afrikajn landojn, kiel Liberio, Sierra Leone. Sed poste RDC = Respubliko demokrata de Kongo –eks-Zairio) La epidemion la lokaj aŭtoritatoj malfacile kontraŭ-batalis. Mankis

rimedoj, precipe por iri en kamparon por flegi kaj savi malsanulojn. Kial ekzistas tie esperantistoj? En tre malbonaj viv-kondiĉoj, meze de senpaŭzaj militoj, homoj bezonas esperon. Nia lingvo Esperanto alportas multon al ili: Dank'al la internacia lingvo, ili povas rompi solecon, starigi rilatojn kun homoj ekster sia regiona areo. Ne malgranda avantaĝo. Foje, la interŝanĝoj inter esperantistoj (ekzemple afrikaj kaj eŭropaj) ebligas interkompreniĝon kaj fidon, kio kuraĝigas nin (iom pli riĉaj). helpi al niaj fratoj. Sed, definitiva avantaĝo por ili estas la kreo de personaj sentoj pri monda civitano. Dank'al esperanto, ili ne plu solas, sed apartenas al mondo, tial ili rifuzas la daŭrajn etnajn kvalifikojn: -*Ĉu vi estas Hutu-o? Tutsi-o? Manjabulengo?-Nenion el ĉio tio: mi estas mondano!*



**Foto 7: Doktoro Mukwege en sia kuracejo en 2013 (Hospilalo de Panzi, apud Bukavu)**  
fonto: Wikipedia Par PINAULT/VOA

Mi dezirus fini tiun artikolon, citante kelkajn samideanojn, kiuj vere bonege laboris por disvolvi Esperanton: Hubert N'TAWU; Alphonse WASEKA (kiu instruas Esperanton) ; Alexis ASUMANI (ambaŭ kreis asocion kaj lernejon SBV =Solidareco Bona Volo); Joël MUHIRE (li eldonis KD kun grupo *Sen-opone*<sup>2</sup> en Esperanto) Kaj Viktor LUFIMPU (ankaŭ li eldonis KD-on kunlaborinte kun Jomo: *Konga espero*<sup>3</sup>). Mi ne povas citi ĉiujn! Se iu volas scii pli, li sin turnu al Pierre Grollemund verdapigo@gmail.com



**Foto 8/ kurso de esperanto en lernejo 2017 Kun Alfonso (3)**

Fonto: aŭtoro



**Foto 9: Ĉe la mezo:  
Alfonso Waseka,  
instruisto de  
Esperanto.**

Fonto: aŭtoro



## **Akvo-projekto en Kalima, DR Kongo** raportas Manfred Westermayer


La fonduso de la germana ŝtato subtenis nian trinkakvo-projekton en Kalima, DR Kongo per preskaŭ 50 mil Eŭro. Krome ni dankas al la fonduso de dungitoj de Robert Bosch (sidejo en Baden-Virtembergo, tutmonde konata pri elektrikaj kaj elektronikaj iloj) kiu donacis 13,5 mil, kaj al niaj samideanoj (AVE-anoj kaj aliaj) kiuj kolektis 5 mil. Intertempe plejgranda parto de tiu kolekto (70 mil USD) atingis la konton de la projekto. Oni aĉetos la teknikajn materialojn en Goma.



Fotoj: kranaroj 2016 Etienne (blua ĉemizo) staras inter la komitatoj de la kranaro: "Hans Bakker kaj Ans Bakker"

Ni kunlaboras ekde 2013 kun Alphonse kaj kun Etienne, kiu planas kaj gvidas la konstru-laboron. Tiamaniere preskaŭ duono de la urbo Kalima-60 mil enloĝantoj-ricevas salubran trinkakvon el 7 kranaroj en siaj kvartaloj. Ĉar la fonto ne sufiĉas por ĉiuj nun oni konstruos akvo-prenilon el montara rivereto, kaj pliajn 5 kvartalajn kranarojn. Krome ni esperas subtenon de dungitoj de alia firmao por 2 pliaj kranaroj. Tiam pli ol 2/3 de la urbo ricevos salubran trinkakvon ene de 300m, kaj la akvoprovizo sufiĉos por la tuta urbo. Denove koran dankon al ĉiuj donacintoj.

Noto: 1 **kompufonoj**: bela vorto inventita de junuloj de TEJO, kunfandiĝanta la nociojn de KOMPUtilo kaj de teleFONO. Ĝi vendiĝas sub markoj, kiaj Apple, Samsung, Wawei, ktp – ĉiuj el ili grandaj uzantoj de koltano!



2 Kompakt-Disko "Esperanto, ilo de paco" eldonita de Vinilkosmo.  
 3 Kompakt-disko "Konga espero: Kiu lingvo?" eldonita de Vinilkosmo

## Projekto subteni traŭmatizitajn infanojn en Goma, DR Kongo

Lucie Yaoli studis sociologion en Goma, kaj Doriane Mukasa studis klinikan psikologion. Ili finis la studadon en Oktobro 2018. Ili estis subtenitaj de Societo Bona Volo – projekto de esperantistaro por subteni infanojn (pagi monon por lernejo aŭ studado, helpi ilin je problemoj). Tiun asocion fondis la itala pastro Duilio Magnani kune kun kelkaj lokaj esperantistoj en la jaro 2003. SBV estas gvidata de Alphonse Waseka. La aktuala retejo montras la historion, agadon kaj personojn: [www.bonvolo.net](http://www.bonvolo.net)

Lucie kaj Doriane decidis uzi siajn sciojn por helpi al traŭmatizitaj infanoj.

En 2019 ili vizitis dum unu tago en Goma la grandan orfejon Don Bosco (subtenata de katolika ordeno de Salesianoj), kaj ankaŭ vizitis la SOS-Infan-vilaĝon en Bukavu (La internacia asocio SOS-Kinderdörfer havas la sidejon en Vieno, retejo: <https://www.sos-childrensvillages.org/>).

Dank al internacia subteno ili povis kunlabori en SOS-Bukavu kaj sperti la agadon tie inter la 11a ĝis 29a de Septembro 2019. Lucie skribis i.a. :

“La Programo de Fortiga Familio estas kompleta socia protekto-sistemo kiel la Infana Vilaĝo. SOS, kiu vivas, estas dinamika. Do la familio profitas per la infanoj. La zorgo pri familioj inkluzive de infanoj, kiuj perdis siajn gepatrojn.”

Bedaŭrinde SOS-Bukavu ne ofertas laborlokojn. Tial ili decidis sekvi la planon organizi propran infan-subtenan organizaĵon kunlaborante kun SBV.

Simone Kiry volis donaci 820 eŭrojn, kion post ŝia morto transprenis ŝia filo Sylvestre; adicie la kolekto okaze de la funebro de Simone kunmetis 412 eŭrojn; sekve entute alvenis en Goma 1320 USD. Ni akceptis, ke Etienne Katchelewa rajtas uzi ĝin provizore (por ripari sian kamioneton) por la akvo-projekto en Kalima. Li transpagos post la fino de la projekto (supozeble en julio 2020) tiun sumon al SBV en Goma, kiu uzos almenaŭ duonon por la projekto “traŭmatizitaj infanoj” de Lucie kaj Doriane. Etienne jam komencis la repagon por la komenca stadio de la infano-projekto.

**Demandojn pri ambaŭ projektoj bonvolu sendi al  
 Manfred Westermayer <[manfred@westermayer.de](mailto:manfred@westermayer.de)>**



## La renaskiĝo de la Steloj



Antaŭ kvin jaroj kaj duono, dum FESTO 2012 en Métabief, Alexandre 'Alekĉjo' Raymond venis al mi kun freneza sed interesa ideo: eldoni Esperanto-monon. Tiutempe FESTO multe inovaciis, ĝi eldonis proprajn tasojn, ĉemizojn kaj pli. Dum la renkontiĝo grupo de homoj ĉirkaŭ tablo diskutis kiel aspektu la moneroj, kiom ili valoru kaj kiel ili funkciu.

Post la somero Alekĉjo kontaktis kun presejo de plastaj moneroj por taksi, kiom realigebla estas la ideo. La plano fine aspektis jena:

- Estu moneroj de 1, 3 kaj 10 Steloj. Tio ebligas rapidan pagadon de diversaj eblaj monsumoj.
- La moneroj estu malsamkoloraj kaj malsamgrandaj, por ebligi facilan kaj rapidan uzon.
- La koloroj estu ruĝa, flava kaj verda, kaj la simboloj gufo, papago kaj krokodilo.
- La valoro de unu Stelo egalas al la plej malgranda kutima elspezo en trinkejo aŭ gufujo, do unu taso da teo aŭ unu glaso da kolao.

La finaj desegnoj estis senditaj kaj 3000 moneroj estis presitaj en oktobro 2012. Bonŝance en la fino de oktobro okazis malgranda renkontiĝo, kiun mi kunorganizis: Klaĉ-Kunveno Post-Somera en Nederlando. Ĝi estis perfekta por testi la novan monosistemon. La publiko ŝatis la monerojn, kaj sukcesis adaptiĝi al ĝia uzado. Post KKPS la Itala Esperanto-Junularo iĝis kuninvestanto de la projekto.

La originala valoro estis difinita kiel 4,2 Steloj en unu eŭro. Poste la valoro estas ligita al la inflacie kompensitaj valoroj de eŭro, realo kaj zloto kun pezaj de 76%, 20% kaj 4%. Do same kiel la antaŭa Stelo, tiu ĉi Stelo teorie tenos sian valoron. Ekde 2012 ĝis 2017 la valoro de unu eŭro en Steloj variis inter 4,040 kaj 4,581. La Steloj estas ĉefe uzataj en trinkejo de junularaj Esperanto-renkontiĝoj. Ili estas valida pagilo en KKPS 2012-2017, IJF 2013-2017, JES 2012 kaj 2017, SES kaj FESTO 2013 kaj IJK 2015. Krome ili uziĝis en kelkaj trajnkaravanoj kaj eblas mendi ilin poŝte ĉe Alekĉjo aŭ Roĉjo.

La avantaĝoj de Steloj en trinkejo estas la facila uzo, la malalta pezo relative al metalaj moneroj, kaj la fiero havi specialan Esperanto-monon. La ĉefa malavantaĝo estas la bezono interŝanĝi alian monon kontraŭ Steloj en la komenco de la renkontiĝo. La kvanto presita en 2012 devus sufiĉi por uzo en eĉ la plej grandaj junularaj renkontiĝoj. Se ilia uzo aŭ kolektado ekster la junulara movado ankaŭ kreskos, tiam dua presado estos pripensinda.

Rogier 'Roĉjo' Hurman

Bonvolu mendi la plastajn Stelojn ĉe [rogier.hurman@gmail.com](mailto:rogier.hurman@gmail.com)

## Julia Isbrücker-Jaro 2020

### Invito al kunlaboro

2020 estas la 100a datreveno de la 12a Universala Kongreso en Hago (1920). Julia Isbrücker kunorganizis ĝin. La realigo de tiu kongreso pruvas, ke ankaŭ granda milito ne povas neniigi nian lingvon. Julia kunfondis Internacian Esperanto-Instituton kaj Universalan Ligon kaj kuneldonis la metalajn Stelo-monerojn, kies nominaloj estas 1, 5, 10 kaj 25 Steloj.

En 2020 aperis arĝenta 50-Stela monero por la honoro de Julia Isbrücker:

Maso 30 gramoj da arĝento 925/1000, diametro 40 mm, eldonkvanto 300.

Prezo 60 € plus sendokostoj (validas por eŭro-landoj).

Bonvolu sendi al mi tekstojn kaj fotojn de kaj pri Julia. La kolektita materialo aperos kaj en la formo de vikipediaj artikoloj en diversaj lingvoj kaj kiel broŝuro. En la fina eldonaĵo via nomo estos menciita.



Sur la monero Julia Isbrücker, desegnita de mag. Helmut Andexlinger, la ĉefdezajnisto de Münze Österreich, 2020.





Walter Klag: [esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at)





**Printempaj pejzaĝoj en Slovakio**



**Printempas en Alzaco**

